

A. PRATS

FRONTO

K

POSTFRONTO

DE

ARAGONIO



BARCELONO

1938

A L A R D O P R A T S



FRONTO
K
POSTFRONTO
DE
ARAGONIO

Elhispanigis Pario

ELDONAĴO DE LA OFICEJO PRI LA EKSTERLANDA
Propagando de CNT-FAI, Esperanto-Sekcio
Barcelono
1938

FRONTO

EKMARŜO AL ARAGONIO

En la epoka emocio de la gloraj tagoj, kiuj komenciĝis la 18an de Julio 1936, por multa tempo ni hardos nian inteligentecon k nian sentimenton kvazaŭ en klara limfo el miregindaj virtoj.

La trafa pugno de la popolanaro malŝargis sian koleron akumulatan dum pluraj jarcentoj kontraŭ siajn malamiĵojn tradiciajn, kontraŭ siajn sklavigantojn permanentajn. Ĝi malŝargis ĝin kun plej fekundiga forto en Madrido, Barcelono, Valencio.

La tradiciema armeo, ĉiuj perfiduloj estis premitaj de la antifaŝista pugno. Estis batitaj k venkitaj en siaj memaj redutoj arte preparitaj, por ke kontraŭ ilin elverŝigu la justa impeto de la amasoj ĵaluzaj al sia libero. La grandegaj interpuŝiĝoj, kiuj kun sia nerezistebla forto antaŭforigis la unuajn celojn de la perfiduloj, nuligis ties perforton ĉiudirekte.

La provoko de la feŭdularo, de la grandburĝaro, de la militistaj kastoj k de la ekleziularo naskis la movadon de la eksterordinara k giganta uragano de la defensiva reago de la hispania proletaro. Ĝies neretenebla forto etendiĝis de Madrido al la fortikaĵoj de Guadarrama-Montaro, al Alkala de Enares (1), al Guadalahara, al Toledo, al la irejoj de Ekstremaduro k suden. De Barcelono ĝi krozis la molan k mildan teron de Katalunio al la limoj de Aragonio, dum samtempe el la marbordo ekveturis la popolaj

(1) Alcalá de Henares.

batalantoj per ŝipoj ornamitaj per triumfaj standardoj k hirtaj pro bataliloj direkte al la Balearaj Insuloj.

Tra la tuta Katalunio, laŭlonge de ĝies vojoj k ĝies kampoj, de ĝies vilaĝoj, kie eĉ en unu sola ne estingiĝis la flamo de la triumfanta libero, potenca krio eliĝis el la buŝoj k unuanima sopiro emociigis k impulsis al agado virojn k virinojn. Agado k krio konverĝis en nur unu vorto: Aragonio!

Ekmarŝis la liberbatalantoj al la morto aŭ al la venko. Miloĵ da ŝarĝ-aŭtomobiloj, da turismaj aŭtoj, parapetataj per matracoj, okupataj de batalantoj duonnudaj, krozis rapidege la vojojn de Katalunio sub la arda sunradiaro de Julio, svingigante siajn standardojn k siajn primitivajn batalilojn kun vizaĝoj incendiitaj de batalemaj varmo k vervo. La senmorta spirito de la Juliaj tagoj multiplikis ĝis nekredibleco, ĝis superhumaneco tiujn batalantojn.

Ili ekmarŝis por liberigi la Aragonian popolanaron el la ungegoj de la faŝistoj. Al Zaragozo!—estis la krio. La unika lozongo de ĉiuj akceptata.

Post la nuligo de la faŝista k militista ribelo en Barcelono k en la ceteraj katalunaj provincoj, la popolanaro armile komencis sin organizi. La cirkonstancoj ne estis la plej bonaj por entrepreni ofensivon teknike k taktike preparitan. Antaŭ ol formiĝis la unuaj milicoj laŭ la momentaj eblecoj, jam lavango da batalantoj en aŭdaca k terurega lukto venkis la avangardojn de la tradiciemaj armeestroj, de la faŝistema Civila Gvardio k de la falanganaj centrigitaj en Kaspé. Ili batalis kun malkovrita brusto k preskaŭ sen armiloj, alfrontante la mortigan fajron de la nestoj da mitraliloj perfekte instalitaj de multa tempo en strategiaj punktoj de la urbeto. Sed ili iris al la venko aŭ la morto. K ili venkis.

La unuaj volontulaj kolonoj atingas al la limoj de Aragonio. Aŭdaco k energio. La Aragonia popolanaro akceptas la batalantojn kiel fratojn, ĝi aliĝas al la improvizitaj formacioj, kunlaboradas entuziasme de la unuaj momentoj

en la epopeo de la 19 de Julio 1936. La kamparanoj grupiĝas kun siaj falĉiloj k siaj ĉaspafiloj al la fortoj, kiuj marŝis al Zaragozo, al Osko (Huesca). La virinoj kuras post la kolonojn por alkuri je helpo al la eksoifantaj k ekmalsatantaj batalantoj. Post ĉiu nuklo da homoj, pli aŭ malpli armitaj, marŝas amaso da viroj k virinoj, atendante la armiltrofeon kaptitan al la malamiko. Kie falas batalanto, vundita aŭ mortinta, dudeko da manoj etendiĝas por kapti la fusilon aŭ la ĉaspafilon el la varmaj manoj de la falinto. Por venĝi lin. Grupoj da ĉasistoj prezentas sin al la komandaro por atentigi, ke ili ankaŭ neniigis la fortojn de la perfidularo en siaj respektivaj vilaĝoj. La milicianaj kolonoj ekmarŝintaj el Barcelono, antaŭeniradas meze de la entuziasmo de la Aragoniaj laboristoj k antifaŝistoj. Ili antaŭeniradas impete, serĉante la ribelintajn hordojn militistajn tra batalo post batalo por sekurigi la postfronton, kiun ili lasas post si dum plusekvas sian vojon. Al Zaragozo! Al Osko!

Sude de Aragonio la Valenciaj milicoj marŝas al Teruel. Intertempe trakuras la lastaj tagoj de Julio. La 24an de la sama monato penetris en la teritorion de Aragonio la kolono de Durruti-Farrás. Ĝi marŝas al Buharaloz, kiu ĵus falas en la povo de la lojaluloj. Oni antaŭeniradas al Zaragozo rapidege. Ĝi ja estas la celo. La ribelulara aviadilaro jam eliris trovi la milicanojn inter Buharaloz k Pina. En direkto kontraŭa al la fluado tra la dekstra bordo de la rivero Ebro oni antaŭeniris super ĉi tiu lasta vilaĝo. En ĝies ĉirkaŭaĵoj elvolviĝis dura batalo, kiu plilongiĝas en konstantaj hazardoj de alterna supereco ĝis kiam ĉe la komenco de Septembro stabiliĝis la linio de la tranĉeara milito. Estas la fronto de Pina-Buharaloz. Antaŭ ol stabiliĝis la linio, Durruti k liaj homoj prenis la vilaĝojn Helsa, Velilja, Osera, Farlete, Monegriljo, Pina de Ebro, Perdigera, Viljafranka k aliajn vilaĝojn, kiuj konfirmas la linion de ĉi sektoro fronte al la malamikaro.

La avangardoj de la lojaluloj estas je 17 kilometroj de Zaragozo.

Dume tra la maldekstra bordo de la rivero Ebro, ĉiam kontraŭ la fluado, antaŭeniradis la kolono de Ortiz. Ĝies celo ankaŭ estas Zaragozo. En la trajektorio de la vilaĝoj ĝi trovas duregan rezistadon. Tamen oni antaŭeniradas. Batalon post batalo havas la volontuloj, kiujn estras Ortiz, ĉarpentisto, kiu baldaŭ rivelas eksterordinarajn dotojn militistajn. Estas liberigitaj la vilaĝoj Azaila, Sástago, La Zaida, Puebla de Híjar k Híjar. En Muniesa okazas fortaj bataloj dum pluraj tagoj. Sed la volontuloj trapasas Mayuela, Azuara, Fuentetodos ĝis Sástago, Almonacid de la Cuba, Belchite k Quinto. La potencaj brakoj de ĉi tiu kolono minacas Karinjena'n, Belchite'n k la ĝeneralan ŝoseon de Quinto al Zaragozo.

Aliaj kolonoj formantaj unu solan parton de la armeo, eniras Aragonion. Tra la linio de Lerida ili supreniras la maldekstran bordon de la Rivero Cinka kun direkto al Barbastro k Osko. Estas la kolonoj de Askaso. La kolono Lenin, Karlo Marks, tiu de Barrio, de Pi k Sunjer k la liberecana Nigro-ruĝo. Barbastro k la plejmulto el la vilaĝoj de la bordoj de Cinka restis fidelaj, kun kelkaj esceptoj.

La maldekstrularo el Barbastro, la laboristoj el ĉiuj ĉi tiuj proksimaĵoj ĵetis sin de la unuaj momentoj kun aŭdaco por preni la strategiajn punktojn k neniigi la faŝistajn fokusojn, okupis la vilaĝojn de la monto de Benaske k Ĥaka, k sur la ŝoseo de Osko atakis la unuajn patrolojn de la faŝistaj avangardoj.

Oni iris super Osko. Oni prenis vilaojn k kvartalojn de la okcidenta parto de la urbo. Okazis bataloj, kiel tiu de Siétamo, dum kiuj ĉi tiu vilaĝo estis neniigita de mitraliloj k aviadiloj. Depost kruelaj bataloj oni prenis Monaheron de Monte Aragon k la kastelon de Malvasta Quinto. Poste la milicanoj starigis siajn neŝanĝeblajn tranĉeojn en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

TRA LA ALTA ARAGONIO

Sen preskaŭ nenia militpreparo ol sia aŭdaco nebridi-gebla en la unuaj tagoj de Aŭgusto (1936) kelkaj grupoj de defemaj batalantoj ĵetis sin al la vojoj k la montaroj de Pirineoj.

Faŝistaj patroloj estis elirintaj el Ĥaka, lulilo de la Respubliko, al ofensiva atako super la Pirineaj vilaĝoj, dormantaj en la trankvilo de pejzaĝoj da fagoj je la zumado de la ventoj k la brua muziko de la torentoj k riveretoj provizumataj per la multa akvo de la neĝaroj fandiĝintaj en la altaj suproj. Estis la milicanoĵoj de Barastro.

La turniĝo de la batalo al la deklivoj, al la altaĵoj de Aragonio grimpis la baron da montoj, kiuj elmontras, en la limoj de Francio, siajn brilegajn diademojn el ĉiamaj neĝoj. La peniga ascendo al ĉi tiuj altaĵoj ne malpliigas la heroan impeton de la liberbatalantoj, sed multiplikas ĝin en agojn de fulmecaj sukcesoj. Vilaĝo post vilaĝo, falis la teritorio sklavigita de la ribelinta reakciularo sub la rego de la Aragoniaj konkerantoj. Vane en la kadukaj fortikaĵoj de la preĝejoj, kiuj superregas domojn k vilaojn, la perfidaj tripintĉapeluloj (2) de la Civila Gvardio, helpataj k stimolataj de la fervoraj instigoj de la pastroj, formis grupojn de malespera rezistado, en kiu partoprenis la akra miasmo malnovega de la karlista krueleco. Pereis

(2) La civilgvardianoj portas kiel kapveston tripintanĉapelon. Tr.

la rezistado antaŭ la puŝo de la Barbastraj montaranoj. Falis la kazernoj defendataj de la lakŝuaj tripintĉape-luloj.

En iuj punktoj ne nur la ĉaspafiloj de la reakciaj vilaĝanoj, apogataj de la fusiloj de la Civila Gvardio, kontraŭstaris la liberigan agadon de niaj montaranoj. Estis veninta ja la ribelulara armeo el flaka, kiu baraktis en la dura batalo de la montaranoj.

La grandega montaro kliniĝas al valoj, verdaj de boskoj, sonoraj de klaraj fontoj k riveretoj. Valo —vilaĝo al-kroĉita al la deklivo de la monto. Penetri en ĉi tiun vilaĝon estis malfacilega entrepreno. Kelkaj fusiloj, strategie instalitaj, sufiĉus por demobilizi la atakontojn. Ne gravis la malfacilaĵoj. La montaranoj, malkroĉante sin tra la altaj suproj super la vilaĝoj, invadis la improvizitajn fortikaĵojn. K la malnovaj kasteloj turhavaj, perditaj inter nuboj, falis antaŭ la frapo de la fusilo k dinamito en ties povo.

La unuaj grupoj da batalantoj, kiuj agadas en senĉesa batalo en ĉi tiu sektoro, baldaŭ aliĝas en unuo. La unuajn formaciojn aliĝas fortoj de C.N.T., devenantaj el la vilaĝoj de la Kataluna Pirineo k pli malfrue venas fortoj el aliaj lokoj de Katalunio. Ĉi tiun unuon formas homoj de ĉiuj partioj k organizoj, kvankam plejmultas la batalantoj de Respublikana Maldekstro k C.N.T.

Diferencas konsiderinde la batalmaniero de ĉi tiuj bravaj soldatoj de la Revolucio, kiu estas observebla en ĉiuj frontoj de Aragonio k de la lojala Hispanio. Inter faŭkoj k intermontoj de Pirineo marŝas la patroloj, zigzagante vojojn de malfacila ascendo k pli malbona direkto. Ili en-filtras sin por poste reaperi en la masivo de la arbaroj, inter la filikaroj, jupineraroj gigantaj. Tiel, kiel la fusilo, estas por ili decidigaj k grandvaloraj armiloj la hakilo k la ŝnuro, kiun portas nodita al unu flanko por depreni sin de krutroko al krutroko, evitante profundegojn k transsaltante la verton de la abismoj, en kiuj muĝetadas stamp-

fite la torentoj el la malglaciigo de la proksimaj neĝaroj.

Tiel, per aŭdacaj k kuraĝaj frapoj, estis prenitaj, dum la tempestaj tagoj —frosto k neĝo— de la vintro, la vilaĝoj el la distrikto de Boltanja, okupitaj de la faŝistoj. Inter grandegaj neĝventejoj bivakante tra la vastegaj masivaĵoj, en paŝtistaj kabanaj, loĝante en ŝafejoj k kuŝante en la kavaĵoj de la humidaj k malvarmaj kavernoj de la montoj, la montaranoj de Benaske forpurigis de faŝistoj la teron de Boltanja ĝis la Franca landlimo.

Ni ĉestis al elmontriĝo de ties kuraĝo k ties aŭdaco batalemaj dum la lastaj semajnoj. De krutroko al krutroko, de monto al monto, marŝis la patroloj k la batalionoj ekmastrante vilaĝojn k strategiajn poziciojn post duraj k nekonitaj bataloj. Kun preskaŭ nekredbla rapido la montaranoj de la Revolucio izoligas grupojn de faŝistoj en la supraĵoj de la montoj, kaptas grandegajn brutarojn el la faŝista zono, k marŝas ĉiam antaŭen sur la vojo de Ĥaka.

La sekcioj de la skiistoj devis lasi siajn tirakrobataĵojn surneĝajn. La malproksimaj neĝventejoj ja abundegas. La krio de la torentoj plenigas ĉiujn montprofundaĵojn. La tagoj estas longaj k helaj. La montaranoj de Benaske iras al batalo kvazaŭ al printempa festo, depreninte siajn tabardojn (3) k siajn ŝafvestojn paŝtistajn.

La antaŭenirado de la montaranoj ne cedas antaŭ io. Kie ili fiksas parapeton k standardon, nur ĉi tiujn lastajn ili lasas por sekvi antaŭen k fiksi novan parapeton k novan standardon.

(3) Tabardo, lanvesto simila al jako kiun portas la paŝtistoj de Pirineo. Tr.

ĈE LA PARAPETOJ

En la parapetoj okuloj maldormantaj k nelacigeblaj super la celilo de la fusilo plenumas gardostaradon. La tago estas trankvila.

En la oficiala parto certe ne estos registritaj ties incidentoj. Nek almenaŭ oni prientos la fajron de la kanonoj de longa altuŝo, kiu intermite batas niajn poziciojn, nek la eksplodoj de la obusoj, kiuj kvazaŭ rapidaj meteoroj krozas siblante la bluan kurbon de la ĉielo por disrompiĝi kontraŭ la muroj de la domaro aŭ en la mola tero de la grensemaĵoj. Kolonoj da fumo k flamoj, gigantaj ŝprucaĵoj el la tero, leviĝas el la punktoj batitaj de la eksplodoj.

La soldatoj de la tranĉeoj certigas nin, "ke la tago estas simple iom malkvieta. Oni ja laciĝos kanoni".

Antaŭ iom estas anstataŭitaj la gardostarantaj grupoj ĉe la parapetoj.

Kelkaj kamaradoj portas panon k keson, kiu pasas de mano en manon rapide. La obusoj plu siblas en la ĉielo k la ŝprucaĵoj el la disskuita tero leviĝas en la kamparo. Opaj k oblaĵ pafoj de la aŭtomataj maŝinoj respondas al la bruego de la kanono. Fine montriĝas pli vasta intermito en la pafoj de la malamikaro. Nun nur la fusiloj vomadas siajn disŝargaĵojn.

La soldatoj grupiĝas laŭŝajne fremdaj al la pluvo da kugloj.

La observistoj en siaj ardeo-nestoj super la arboj ob-

servas atenteme per la prismoj de longa altuŝo la movojn de la malamikaro.

Malaperis la timo al atako.

Ni ĉeestas kolektivajn konferencojn super milit-taktiko k batalmetodoj. La interŝanĝado de observoj, la ekspozado de konsiloj k rekomendoj flanke de la ĉefoj k la instruktoroj daŭras ĉirkaŭ duonhoron. Poste la grupoj subdividas sin en grupetojn. Ĉiu havas sian instruktoron. Kiam la relativa trankvilo etendiĝas tra la frontoj, la soldatoj de la Revolucio donas sin kontentigi siajn sopirojn kulturajn. La plej diversaj materioj de la homaj priokupiĝoj estas debatataj, komentataj k klarigataj de la soldatoj k la instruktoroj. En ĉiu grupo oni pritraktas malsaman temon.

Estas grupoj jam tre sporadaj, feliĉe, kie ricevas lecionojn de leg- k skribarto la analfabetanoj. Neniu soldato post restado ĉe la batalfrontoj revenos sen scipovi legi k skribi. En ĉi tiu tasko aboli la analfabetismon kunlaboradas ĉiuj batalantoj. Sur kelkaj maldelikataj tabloj improvizitaj kun tabuloj el malnovaj skatoloj la soldatoj pentras siajn desegnaĵojn sur la kajerojn (4).

Estas emociiga ĉi tiu sopiro komuna de la batalantoj al kultura levigo.

Ĉiu divizio havas siajn amuletojn k iun objekton de dubinda valoro, kiun la soldatoj montras kun orgojlo al kiuj ilin vizitas.

En la sektoro okupata de la fortoj, kiuj formas la blo-

(4) La procento de la analfabetanoj en pluraj lokoj de Hispanio atingas 70, 80 k eĉ en kelkaj ĝis 90. La kursoj ĉe la batalfrontoj estas fondataj laŭ iniciativo de la milicanoj, kiel rezulto de fortega strebado al studado, kiu ne eblis antaŭrevolucie pro la ege malfavoraj kondiĉoj. Plej ofte la kursoj estas gvidataj de pli inteligentaj k instruitaj junuloj, kelkiam instruistoj. Ĉe pluraj parapetoj oni fondis ankaŭ kursojn de Esperanto kun, cetere, tre sukcesaj rezultoj. Sed la ioma ripozo k ankoraŭ pli ioma trankvilo, kiujn ĝuas la milicanoj, unuflanke, k la ne tre riĉa literaturo tiacela, aliflanke, iagrade malakcelis la pli bonan aranĝon k gvidadon de la Esperanto-kursoj. Tr.

kadon de Hueska, sudokcidente de la urbo, la soldatoj havas nenion alian ol etan zoologian parkon kun pli ol 50 dresitaj animaloj. Ardeoj, kunikloj kun diverskolora hararo, ratoj, sorikoj, musteloj, gufoj, koturnoj, alaŭdoj, lacertoj, birdoj de la plej variaj specoj, gigantaj griloj. Diversaj serpentoj. Ĉi tiu svarmo da animaloj estas orgojlo de la Divizio. Fakulo de Natura Historio eksplikas, kiam povas, al la kamaradoj je vido de la vivantaj ekzempleroj la karakterizojn k la kutimojn de la animaloj.

Ankaŭ ne estas divizio sen biblioteko. Kiun ni vizitis estas instalita en kabano kovrita per verda branĉamaso. Tie legas la soldatoj pli librojn ol gazetojn, dum povas, ĝis la horoj de la ŝanĝo de la gardostarantoj.

Plena frateco unuigas ĉiujn ilin. Impresiga unuanimeco en la prijuĝoj super la marŝo k la problemoj de la milito estas videbla en ĉiu vorto. Ĉi tiuj estas la bravuloj, kiuj batalas. Kiuj batalas k laboras.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
RESERVA FALC-233-36-1007-1910

LA TOMBARO DE HUESKA

La tombaro de Hueska estas unu el la plej konataj punktoj de la ofensivo de la soldatoj de la Revolucio super la sieĝata urbo. Tie flanke estas la unuaj domoj. Je duona paf-tiro normala de fusilo. La mitraliloj albatas la enirejon al la urbo certpafe.

La kontrasto estas konsiderinda: la zono de la supera k definitiva paco —la tombaro— aliformiĝis en loko de senĉesa luktado.

La fortoj, kiuj ĝuste trovas sin en ĉi tiuj avangardoj intermite ŝercadas:

—Ĉi tie ni estas en la paco de la mortintoj. Tiom riĉe!

Malgraŭ la duraj aktivecoj okazintaj en ĉi tiu parto de la fronto de Hueska, la tombaro, je unua vido, ne perdisian karakteron de ilustraĵo el religia rakonto. La lancoj de la verd-nigraj cipresoj eskortas la stratojn de la urbo de la Morto, galvanigita dumtage k dumnokte de stranga aktiveco. Stranga por tiu kiu vivas en la zono. Normala por la soldatoj, kiuj defendas la atingitajn poziciojn. La rekonkero de ĉi tiu urbo ne estus certe oportuna promeno. La kanonoj de la Revolucio atingis malfermi breĉon en la muroj, kiuj kvadratas la teron de la paco relative eterna. Ili estas fortikaj k solidaj por la revolucia milito. Ĉiu tombo estas tranĉeo. Ĉiu maŭzoleo -fortikaĵo por mitralilo. La batalo por la ekposedo de ĉiu vico da niĉoj estis batalo, en kiu ne nur intervenis la armiloj funkciigitaj por ega ekago, sed ankaŭ eta ekprovo mobilizi la mortintojn. La ombroj

de tiuj kiuj trovis relativan ripozon, devis diveni la tagon de la finala Juĝo. La kvar Apokalipsaj Rajdantoj (5) ekde du monatoj direktadis sian mortigan frapon tra la cirkaŭaĵoj de Hueska. Kiel en la profetaĵo de orakolo de Pathmos, la tomboj malfermiĝis k danco da skeletoj k ostaroj leviĝis k ekvagis tra la etero ĉe la eksplodo de la obusoj. La sirenoj, kiuj anoncis la alarmon antaŭ la atako de la aviadilaro super la interno de Hueska, estus facile konfuzeblaj de la vagantaj mortintoj kun la klarionado de la trumpetoj de la heroldoj en la tago de la rekarniĝo. Al ĉio devis al kutimi la mortintoj, inkluzive al la konfuzigaj alarmoj. La vivantoj siaflanke kunvivadas kun la mortintoj en perfekte normala reĝimo, laŭ la necesoj de la disciplino de la revolucia milito.

La bona tempo tre florigis ĉi tiun teron sanktan, kie dormas, kiam povas, ĉiuj, niaj fratoj k nia sambatalantoj, la vivantoj. Floras la geranioj k la diantoj, kune al la funeloj de la eksplodoj k kune al la memaj tomboj k la surtomba grundo kovrita de altal herbaĵoj. Sur la tombeto de infano kreskas rozujo kun brilegaj ruĝaj rozoj. La vivo klopodas florigi ĉiujn angulojn spite al la Morto.

Ĉi tie prezentis malpian k malpiigan batalon la faŝistoj, certe instigataj de sia tre laŭdita profesio kristana k sia respekto al la antaŭuloj.

Kristane ankaŭ, en ega fosaĵo ĉe unu angulo de la tombaro, kiun ili elfosis antaŭ la memaj enterigotoj, —respublikanoj, anarkistoj, socialistoj k maldekstruloj aŭ simple parencoj de maldekstruloj el Hueska, Ramon Acin, Sender, tiom k tiom da aliaj martiroj— ili fusilmortigis centojn da homoj k virinoj, kiuj noble proklamis sian fidon k sian aliĝon al la Respubliko k la Revolucio k la rajton de la laboristaro. Ĉi tie kiel furiaj hienoj ili profanis la tombojn de la liberigintoj de la hispana popolo, Galan k Garcia Hernandez, murditaj per la memaj kugloj de la

(5) "Los Cuatro Jinetes del Apocalipsis", romano de Blasko Ibanjuz.

hodiaŭaj faŝistoj en la glora epilogo de la heroa gesto de Haka.

Eĉ dum la plej tragikaj alternativoj ne defalas la sana bonhumoro en la vicoj. La vivo en la urbo de la mortintoj estas pli komforta ol en aliaj sektoroj de la tranĉeoj k la parapetoj. Tion scias ĉiuj batalantoj de la Aragona fronto, kiuj travivis en ĉi loko konstantan danĝeron k fortan batalon. La pretendaj niĉoj k maŭzoleoj de la mezklasaj familioj de Hueska servas kiel brilegaj okupejoj al la soldatoj.

—Ni najbaras kun la elito de Hueska k ni kondutas tre bone—ili ŝercas.—Ili estas diskretaj k silentemaj.

La familianoj de la batalantoj ankaŭ havas satisfakciajn komunikojn pri la bonfarto de la vivantoj inter la mortintoj.

Antaŭ nelonge soldato skribis al siaj gepatroj jene:

“Karaj gepatroj. Mi estas ekde certa tempo en la tombaro de Hueska je unu manetendo de la stratoj. Mi fartas brilege bone. Ĉiuj ni estas tre bonfartaj ĉi tie. Ni najbaras kun la elito de Hueska... Mi mem dormas ĉiunokte kun la familio sinjoro Manuel Kamo, enfermita en sia ĉerko tegita el zinko. Ĉiuj ni estas tre bonaj amikoj”...

TRA LA EBENAĴO DE TARDIENTA K ALMUDEVAR

Ni malsupreniras tra la mola deklivo de la montetoj, lastaj elstaraĵoj de la orografia sistemo de la montaro Guara, al la ebenaĵoj de Tardienta k Almudevar. La linioj de la ofensivo k la defensivo de niaj fortoj kuras laŭlonge de ĉi tiuj montetoj ne tre altaj, la plimulto el kies deklivoj k suproj jam estas prikulturataj de la transformiga strebado de la kamparanoj. Eĉ unu manmezuro da tereno nekulturata ne restu, diris al si ili ĉe la komenco de la milito. Kvankam la rekomendo ne estis facile realigebla, la kamparanaro estis anticipinta pri sia kapablo. Impulsata de la instinkto de konservado k de sia batalemo, ekde la unuaj momentoj metitaj je servo al la afero de la libero, ĝi preparis k semis la grundon kie neniam antaŭe estis ĵetita la semo, kie nur kreskadis senkulturaj kreskaĵoj, timiano aŭ lavendo k kardoj. Nun ĉio estas grenaĵoj. K grenaĵoj bone kulturataj. Unuj jam orkoloraj k aliaj ekmaturingantaj por rikolto. Eĉ sur la etaj suproj, kiuj elstaras al la horizonto, de la malproksimaj geologiaj zig-zagaĵoj de Pireneoj ĝis tie, kun siaj formacioj el dezertaj dunoj de plej kaprica formo, oni semis, se trovis kultureblan grundon.

En ĉi tiu ebenaĵo serpentumadas k interserpentumadas pluraj riveroj k riveretoj, alfluoj de la riverego Galjego. La suno diverĝas faskon da radioj. Kelkaj soldatoj banas sin en la fluadoj k la profundaĵoj de la riveretoj. Aliaj ripozas ope en la densarabaj bordoj. Estas parolata kataluna

lingvo. La plejmulto el la soldatoj ja parolas katalune. La gardostarantoj de la strategiaj vojpunktoj, duonnuĝaj, ekzamenas atenteme niajn dokumentojn. Tardienta konservas ankaŭ la profundajn k dramajn signojn de la milito sur siaj stratoj, konstruaĵoj, ĉirkaŭaĵoj. Ĝi estas en la linio de la fajro, en la linio de la batalo. Ĝin altuŝadas frekvente la faŝistaj kanonoj el la malamikaraj pozicioj de Almu-devar.

Ĉe la komenciĝo de la milito super la sama urbo ekfuriozis la trombo de terura batalo, kiu daŭris kelkajn tagojn, decidita finfine je nia favoro.

Ankaŭ en ĉi tiu sektoro elmontris sian heroecon la soldatoj de la fronto de Aragonio. La pozicio konata sub la nomo Kapelo de Sanktulino Kiteria (6) estis sceno de la plej duraj bataloj. Kun elkovrita brusto je la tria fojo estis prenita ĉi tiu monto. De la kapelo restis nenio. Amaso da rubaĵoj. Sed restas la malamikaraj tranĉeoj, kontraŭ kiuj direktas sin la plej duraj bataloj de ĉi tiu sektoro, Tardienta-Almudevar.

Komencas de la ĉirkaŭaĵoj de Tardienta la orografia sistemo, kiu atingas al la ŝtonoza masivo de la montaro Alkubiere. Laŭlonge de ĉi tiu montaro ĝis 40 kilometroj la avangardoj de la Respubliko rigardas Penjaflor, en la ebenaĵo de Galjego k Ebro, en kiu leviĝas la urbo Zaragozo. La montaro Alkubiere estas observejo k ŝirmilo, kiu baras la pason de kiu ajn malamika ekskurso al ĉi tiu parto. Ĝies altaj k kurbaj ŝtonpintoj, ĝies vasta ebenaĵo, kiu inter la montetoj etendiĝas sub la klara ĉielo, festonata de krispaj arbustoj k etaj boskoj, jam konas la emocion de la miltgestoj k la ekstremo de la armeoj al ekmarŝo k batalo por sia libero. Ĉi tie okazis en la pasinta centjaro la milito por la Sendependado, trapasis kun dura batalo la armeoj de patriotoj, kiujn komandis la granda militisto Mina la Juna. Nemaŭ proksime de la vilaĝo Alkubiere la in-

(6) Ermita de Santa Quiteria.

vadintaj trupoj de generalo Paris estis venkitaj de la grupoj k la geriljoj de la kamparanoj en la fama batalo de Alkanjiz.

La malnova eksperimento de tiu alternativa milito eble pripensigis la komandantaron, kiu aktuale komandas la bataloperaciojn en la malamikara kampo. La baro de la montaro estas neforpuŝebla. Ĉi tie oni ne trapasos. La montoj, la rokoj k niaj soldatoj, kiuj el ĉiu faris nevundeblan citadelon, antaŭforigas kiun ajn provon de la malamikaro. Anstataŭ tio dum multa tempo la grupoj de niaj defiaj batalantoj trapasas la faŝistajn gardliniojn k enŝteligas al la ebenajo de Penjaflor k Viljamajor por realigi aŭdacajn ŝturmojn, kiuj semas alarmon k panikon en la vicoj de la faŝistoj k en la vilaĝoj submetitaj sub sklaveco, sub la superrego de la eksterlandaj hordoj, kiuj apogas sian potencon en Zaragozo kaŭze de la perfido de Kanelja. De la montdeklivoj de Alkubiere dekroĉas sin la defiaj grupoj de la geriljol super la ebenajo. Unu tagon ili alportas kaptitojn, alian tagon alpasintojn el la faŝista infero de Zaragozo, aliajn tagojn kiel trofeojn —la armilojn de la gardostarantaj patroloj de la faŝistoj, aliajn tagojn— brutaron kun paŝtistoj k ĉio...

Flanke la serena blueco de Alkubiere. Nord-okcidente de la vojo, kiun ni iras. Okcidente la montoj, kiuj fermas, venante el Katalunio tra Lérida, la malsekajn valojn de rivero Cinka. Ni trapasas la vastan ebenajon de Monegros, stepa zono, sen arbo, nek elmontro de ombro. Fekundaj grundoj laŭdataj k mallaŭdataj, laŭ onidiro, en la folkloro de la falĉistoj de tuta Hispanio.

Oni diras, ke ĉi tiu ebenajo ega estas la grenejo de Aragonio kun Cinko Viljas, ankoraŭ en la posedo de la faŝistoj. Ĝis kie atingas la rigardo ne estas videbla eĉ unu arbo, eĉ unu verdaĵo. Ĉio estas greno k hordeo. La loĝantaro de Kandasnos, brunigita de la sunardo, estas ekvidebla fine kun siaj akvujoj ĉirkaŭ la domoj. La vojo de Bu-

haraloz zigzagadas inter montetoj kovritaj de pinoj k kru-
taĵo, kies kuŝejo aperas interspace ankaŭ semita.

Buharaloz estas ŝlosilo de la avangardoj en la sektoro
situita sur la dekstra bordo de Ebro kontraŭ la fluado.

La vojo nin kondukas al Pina de Ebro. Ĉi tie jam estas
la batal-linio. Ni estas je 17 kilometroj de la ĉefa urbo de
Aragonio. De el la montetoj de Pina ni vidas kiel kelkaj
malamikaraj aviadiloj estas esplorantaj, observante niajn
poziciojn por poste faligi sur ilin sian ŝarĝaĵon mortigan.
La ŝprucaĵoj el la eksplodo leviĝas pluen apude al la fluado
de la rivero. Ĉio estas movo k sopiro ĉe ĉi tiuj linioj. En-
tuziasmo k aŭdaco. La batalo estas komencinta. De ĉi tie
estas perceptebla klare la kanonado, al kiu subigas niaj
baterioj la malamikarajn poziciojn situatajn sur la alia bor-
do de la rivero en la ĉirkaŭaĵoj de Kinto. La iniciativo de
la atako estas nia tra la bordoj de la rivero. Ankaŭ en la
avangardoj de Viljafranka nia artilerio ululadas k voma-
das sian mitralaĵon kontraŭ la malamikaro. Krakadas la
mitraliloj k bojadas la morteroj. La bataloperacio estas
samtempa. Egale k kun la sama impeto atakas la revoluciaj
fortoj, kiuj tra diversaj vojoj, sed paralelaj al la situacio
marŝas al Zaragozo. Unuflanke, maldekstre de Ebro, ĉiam
en direkto kontraŭa al la fluado, nia batalfajro havas kiel
objekton Kinto k la zonan de Fuentes de Ebro, k aliflanke
dekstre de la rivera kuŝejo, la movadoj de niaj trupoj kun
nedetenebla impeto antaŭenmarŝas al Alfaharin. Vilja-
franka estas je 15 kilometroj de Zaragozo. La revoluciaj
avangardoj sur Alfaharin atingas jam je 12 kilometroj de
la ĉefa urbo de Aragonio. La malamikaro estis forbalaita el
la tranĉeoj, kiujn li havis en ĉi tiu punkto. En ĝies tran-
ĉeoj ŝildas nun nia ofensivo dura k aŭdaca. De el ĉi tiuj
montetoj, apudaj al la vojo, estas videbla, purigita el ba-
talfajro k malamikaraj minacoj, Burgo je 2 kilometroj
de Zaragozo, preskaŭ ĝies antaŭurbo. K plue en la fondo
la konstruaĵoj de la fama urbo subigita al la malnobleco
de la faŝista regado. Ĝis ĉi tiuj tagoj, en kiuj niaj fortoj

atingis depost streĉitaj bataloj novajn poziciojn sur la vojo de la urbo, la rigardejoj al Zaragozo estis la avangardoj de Puntaza k Penja Perdigera. De tie estas videbla Zaragozo. Estas kalkuleblaj la turoj de la preĝejoj, preskaŭ je simpla rigardo k la elstaraj kupoloj de la Baziliko de Pilar, tiom simila arkitekture al la silueto de la Londona parlamentejo... Eĉ estas ekvidebla la kripligita sonorilejo de Seo, kie la ribelintaro sen ajna religieca konsidero estis instalinta antiaeran baterion.

Surdiga bruado de la motoroj plenigas la horizonton. Sur la nuboj, disfadenitaj de la somera posttago, 12 aeroplanoj, pretaj por batalo, flugas tre alte. Momento da infinita atendado k krio resonas en ĉiuj avangardoj:

—Estas niaj!

La aera eskadro marŝas en ascenda linio. Estas videble, ke ĝi plialtiĝas. La aparatoj ekpasas k trapasas la nubotavolojn kvazaŭ iaj strangaj radŝpiniloj, kiuj funkcias sur blankaj ĉielŝaflanoj. Leviĝas la surdiga zumado de la motoroj. La distanco inter niaj avangardoj k Zaragozo ili trapasas kun nekredebla rapideco...

POSTFRONTO

POR NOVA VIVSISTEMO

La batalado kun ĝies torentoj da oferita vivo, ĝies angoroj k ĝies sopiroj ne havus ian sencon, se post la entrepreno iniciatita de la hispana popolanaro en la gloraj tagoj de Julio 1936 ne vidiĝus klare malfermita al la futuro ero de paco, de bonstato k vivo digna por kiuj strebadas ĉe la batalfrontoj por rekonkeri per fusilo heroe pli bonan estonton por la popolanaro, ke ĝi ne restu en konfuza programa certigo, sed en longdaŭra k palpebla realaĵo.

La batalantoj, kiuj luktadas, ne luktadas, ne mortas por abstraktaĵoj pli aŭ malpli brilaj, nek por promesoj pli aŭ malpli allogaj. Ĝuste pro tio estas batalanta la tuta hispania proletaro, la tuta hispania popolanaro dum 7 jaroj ekde kiam stariĝis la Respubliko en Hispanio. La zorgoj pri la realigo de la transformoj ekonomiaj k politikaj estis lasitaj al la arbitro de la partioj, kiuj estis levitaj al la respondeco de la Povo. Kun blinda konfido ne nur al la honesteco de ties homoj, sed ankaŭ al ties preparo k kapablo por plenumi la promesojn, kiuj estis agitvorto de la politikaj k sociaj movadoj ekde la stariĝo de la Respubliko. Kun kia rezulto? La okazanta milito donas la respondon, samtempe elokvente elpravas la malkapablecon nesondeblan de la plejmulto el tiuj kiuj intervenis en la direktado de la publikaj negocoj. La amara k glora eksperimento de niaj tempoj kun la mizeroj de ties originoj k la grandeco de ties elvolviĝo nune konsistigas kompletan skemon de elimino k kredetigo rilate al personoj, partioj k procedmanieroj.

Io mortis en Hispanio k io ega k brilega naskiĝis. Io kio disvolviĝas kun la viva impeto de nova vivsenco ebligante realigojn grandskale. La konstruada afero de la hispania popolanaro dum la monatoj de la milito ne estas certe eksperimentoj k provoj. El la Revolucio, el ĉi tiu fonto neelĉerpebla tra la centjaroj, el ĉi tiu fonto fekundiga k abunda elŝpricis surprizigaj kristaliĝoj, brilegaj faroj, novaj institucioj k tamen perfekte harmoniigitaj kun ĉio vivtaŭga k utiligebla de la hispana tradicio, la populara tradicio rilate al la formoj de kunvivado k al la ekonomia akortiĝo de ĉiuj kiuj laboras k produktas. Ĉi tiuj faroj estas la Kolektivoj? K kial ne? La komuno.

Ni pristudis ĉiujn provojn al ekonomiaj k sociaj transformoj nesukcesintaj malgraŭ la bonvolo, kiu prezidis ties stimulojn.

Ni konstatas la disvolviĝon de la hezitaĵoj, kiujn por starigi la Agraran Reformon oni donis en pluraj punktoj de la lando kun preskaŭ nula rezulto. Rilate al la kolektivo kiel al la individuo. La motivo, kiu nin igis al la konstato de tiuj provoj, nun nin irigis al tero de Aragonio.

Ni vidis kiele funkcias la Kolektivoj de Aragonio. Ni trastudis ĝies starigon laŭ la ĝenerala amplekso de la ekonomio de Aragonio, grandparte fundamentita sur la novaj normoj de kolektiva tipo. Antaŭ la vido k antaŭ la konstato de ĉi tiu fenomeno de egaj eblecoj, jam realaĵo palpebla k en marŝo, kiel unueco de nova ekonomio k novaj vivmanieroj, sen enfali en sensacian nekonon, nek en hiperboligon nek allogon, ni certigas, ke la bazoj k la ekzemplo de la socia transformado, por kiuj ni estas luktantaj k estas luktantaj ĉiuj laboristoj, estas en Aragonio. Eble en aliaj punktoj de la lojala Hispanio la krea spirito de la popolanaro povas oferti al la studonto realigojn de egala tipo k analoga funkciado. Mi dubas tamen, ke estas superitaj la realigoj de la Aragona popolanaro.

Aragonio en siaj vilaĝoj, en siaj regionoj, en siaj institucioj estas popolo el emancipitaj laboristoj. K eman-

cipigitaj de la ago k la volo de la memaj laboristoj Aragonaj. Ties kreaĵoj ne aperis per si mem. La hazardo k la kaprico ne estis la direktintoj de ĉi tiu vastega movado de civilizacia emancipado.

4 fundamentajn aspektojn ofertas la postfronto de Aragonio en ĝies entuta esprimo: ĝies novaj politikaj organizmoj, la kolektivaj normoj, kiuj direktadas la vivon k la ekonomion de la popolo, la transformo, kiu estis okazigita en ĉiuj faldoj de la ekonomia k la socia kunvivado k la morala klimato laŭ kiu moviĝas ĉiuj novaj elementoj determinantoj de profunda renovigo en la tuta teritorio fidela al la Respubliko.

La neceso disciplini la gigantan kurenton transformigan, kiu antaŭforigis en la tuta lando la ribelon de la militistoj k faŝistoj kontraŭ la popolanaro k ĝies institucioj, en Aragonio estis rapide priatentita. La tuta ŝtatmaŝino forrenversiĝis fortrenita de la fortoj, kiuj partoprenis en la ŝturmo: la ribelinto k la armita popolanaro. Urĝegis do la starigo de la defendo k la funkciigo de batalorganizo en ĉiuj terenoj. En la tereno politika, socia k ekonomia. En la zonoj rapide liberigitaj aŭ fidelaj al la Respubliko oni devis procedi al la senarmigo, ekonomie, politike k socie, de la kunaŭtoroj de la ribelo k ĝies aliĝintoj. Post la unuaj monatoj de konfuzo k antaŭ la vido de la perspektivoj, kiujn la batalo ofertis, la nomita neceso imponis atenton urĝegan k neekskuzeblan.

Ne eblis —la volo de la popolanaro ĝin proklamis— reveni al la restarigo de tio kio falis por ĉiam laŭ la historia leĝo de la revolucia procezo de Hispanio.

Interne de la ampleksaj avantaĝoj de la fundamenta kodo de la respublika ŝtato, la eblecoj starigi ĉion en progresema k renoviga senco postulis tujan realigon. Aliparte la referendumo de la armiloj en la manoj de la popolanaro por sia defendo k la defendo de siaj interesoj diktis vojon klaran k glatan.

Tiu tiom brilega perspektivo sufcis por realigi tutece

korpon de konstitucia doktrino precize en ties mandatoj. Aliaj kialoj de pli granda graveco rekomendis procedi aŭdace k rapide al la muntado de novaj organismoj kapablaj per sia fleksebleco k efiko eltiri la maksimumajn alportojn al la landa vivo k fine kontentigi la postulojn de la luktado. La Revolucio k la milito baldaŭ trovis la organismojn, kiuj devis doni al ili fluejon k disciplinon. La Konsilantaro de Aragonio, resumo de la ambicioj renovigaj de la tuta Aragona popolanaro, en ĝies malsamaj esprimoj politikaj k sindikataj en la reprezentado, rapidis organizi socie k ekonomie la tutan liberigitan teritorion de la Respubliko.

Por alfronti la batalon aperis la gloraj Milicoj, en ekonomia k politika rilato, aliaj organoj estis konformigitaj al la necesoj de ĉiu tago, de ĉiu horo, de ĉiu minuto.

Se grava k surpriziga estis la procezo de la integriĝo de la elementoj necesegaj por la militdefendo de la hispania popolanaro, ne malpli konsiderinda estis tiu de la nova integriĝo de ĉiuj organismoj renversitaj de la ribelo kontraŭ la popolo k la polonara volo. La Konstitucio de la Respubliko en ĝies profunda, senco transformiga, en ĝies noblaj impulsoj renovigaj, en la aŭdaco de ĝies mandatoj, por la interfero de la politiko-sociaj fenomenoj, kiuj ekde 1931 okazis, dum la paso de la tempo ne atingis realiĝi en la vivo de la lando. Ĉe la eksplodo de la faŝista movado la Leĝo de la popolo, atakita k minacita de definitiva detruo, imponis sen trograndigi siajn principojn, la realigon de ĉiuj tiuj mandatoj rilataj al la politika, socia k ekonomia transformado.

Oni kreis la Konsilantaron de Aragonio. Ĝi resumas la plenecon de demokrata aŭtoritato, kiu ebligas la proporcion partoprenon en ties departementoj de ĉiuj antifaŝistaj sektoroj politikaj k sindikataj de Aragonio, la instrumento de la futura aŭtonomio de Aragonio k la refirmigo de la libero de Aragonio tiom praeca en la civilizacio k la rajto. Aragonio perdis kiel libera lando la prerogativojn de siaj respektindaj institucioj popularaj en la okazo de la

Senfina Milito, sub la tiranio unuiga k centriga de la Burbonoj. Ĉi tiu malfeliĉa evento ne okazis sen batalo. La sango de la popolanaro de Aragonio fluis torente.

La Konsilantaro de Aragonio restarigita estas en certaj aspektoj la instrumento de la aŭtonomia vivo, kiun regas. Ĝies prezidanto reprezentas la respondecon k la prerogativojn de Ĝenerala Gubernatoro de Aragonio k de supera reprezentanto de la Centra Registaro.

La tuta popolanaro de Aragonio, unuigita k kompakta, estas ĉe la flanko de la Konsilantaro. La organizado de la vivo en Aragonio sur la bazo de la postuloj de la milito k de la transformado, kiun ĝi imponas, realigita de la Konsilantaro estas konsiderinda.

La teritorio de Aragonio estas surfaco de 47.391 kv. km. Ĝies enloĝantaro entuta estas 1.000.000.3 kvaronoj el ĉi tiu surfaco estas tero lojala al la Respubliko. Konsiderinda spaco de la kvara parto de Aragonio estas sub la procezo de la milito.

Ĉirkaŭ 600 vilaĝoj de Aragonio sub la aŭtoritato de la Konsilantaro de Aragonio realigas sian lokan transformadon k decidige apogas por gajni la militon.

Pro la urĝeco de la ĝeneralaj postuloj oni procedis al la ekonomia deŭdo de la tuta Aragona zono en komarkojn. La ideo ne estis nova. Ĝi havis en Aragonio profundan radikon ekde kiam komenciĝis la movadoj de ekonomia tipo, kiujn animis dum kvaroncentjaro fl. Kosta k lies amikoj.

La divido en jurajn distriktojn estis arbitra, pliĝustigita al la politika reĝimo de la monarkio k al ĝies utiloj. La centro de ĉi tiuj distriktoj havis ekonomian k politikan karakteron de subpremado. En ĝi rezidis ĉiuj risortoj de tiranio de la monarkia reĝimo kun siaj servistoj k lakajoj. Sub la ombro de la monarkia ŝtato sin ŝirmis la plej perversaj k detruemaj specoj de friponoj k et-tiranoj, de advokatoj, semantoj k stimulantoj de kvereloj, feŭduloj k farmistoj k ĉe tio arbitrantoj de la publika trankvileco.

Al ĉi tiu politika koncepto pri la graveco de la komarko kontraŭis la ekonomia koncepto. En iuj distriktoj la centro konsistigis ekonomie k politike koincidajn punktojn. Pro tio ĝi ne perdis sian karakteron de nesto de tiranio k ĝies klimato favoris al la disvolviĝo de la plej senkrupulaj persekutoj kontraŭ la humilaj, kontraŭ la laborpopolo, kontraŭ la justemaj k dignaj urbanoj, amantoj de la progreso k la libero.

La komarkoj en la teritorio de Aragonio ascendas ĝis 21.

Antaŭ ol procedi al la starigo de ĉi tlu ordiga divido en granda numero da vilaĝoj oni alprenis konkorde kun la plimulto el ties najbaroj, kiel ekonomian reĝimon de organizado k kunvivado, la kolektivon.

Ĉiu komarko konsistigas Federacion de kolektivoj, regata de Administra Komisiono demokrate elektita de la kolektivoj de la koncernaj vilaĝoj. La Administra Komisiono reguligas la ekonomian vivon en ĉiuj ĝies aspektoj k la funkcion de la kolektivoj. Ĉi tiuj k la Administraj Komisionoj de la Komarkoj centrigas siajn aktivecojn por la ekspluatado de la landaj riĉaĵoj sub la direktado de supera organismo: La Regiona Federacio de la Aragonaj Kolektivoj, kies direktivantaj membroj ankaŭ estas elektitaj demokrate sur la bazo de la kolektivaj organizoj. La Regiona Federacio de la Kolektivoj estas en strikta kontakto kun la komarkoj de Ekonomio k Agrikulturo de la Konsilantaro de Aragonio, kiuj estas rektaj ligiloj kun la mema Konsilantaro k plie kun la reprezentanto de la registaro de la Respubliko al la celoj de la enlanda ekonomio k la ĝenerala produktado.

Ĉiu komarko, pere de sia Administra Komisiono, kun la celo ekskluziva ordigi la ekonomion, rapidis meti en efikan funkciadon la novajn lokajn organismojn: la kolektivoj. Malfacilaĵoj por la realigo de ĉi tiu entrepreno? Multaj... Depost certa tempo de ĝies funkciado estas prezentablaj kiel ekzemplo de organizado, de laboremo, de

respondeco k de prospera vivo, pluraj komarkoj k pluraj kolektivoj en la tuta Aragonio. La perfektaj realigoj malgraŭ la maloportunaĵoj k la kontraŭecoj, kiujn imponas la milito, servas kiel leciono k stimulo al ĉiuj Aragonaj laboristoj.

LA KOLEKTIVOJ

Tradiciaj kondiĉoj iagrade favoris la starigon de la formoj de kunvivado k laboro kolektivaj. Aragonio estis el inter ĉiuj regionoj de Hispanio unu el la malplej ekspluatata de la feŭduloj parvenuoj, posedintoj de vastegaj bienoj k farmejoj. Ĉe la eksplodo de la revolucio finiĝis ĉiuj procesoj de la komunumoj kun la privatuloj, kiuj pro malbonvolemo donis sin al rabado pli aŭ mapli tolerata de la oficialaj faktoroj. Aŭtomate, kio estis al la popolanaro transpasis al ĝies manoj k al ĝies libera dispono. Al la kvanto de la teroj k la bienoj, kiuj per ĉi tiu procedmaniero, justa k rajta, transpasis al la dispono de la Kolektivoj, kiuj ekformiĝis, oni devas aldoni la terojn de la faŝistoj, kiuj estis eksproprigitaj de la popolanoj.

La Kolektivoj, ekde siaj unuaj paŝoj, povis disponi pri grandaj etendoj da ekspluat-teroj. La et-posedantoj instinkte vidis siajn interesojn ekminacataj de la amasaj interesoj de la kolektivoj. Paroli pri la timo de la et-posedantoj antaŭ la transformado tiom rapidege okazanta, estas afero justa, ĉar korespondis al realo. Korespondas ankoraŭ, kvankam la numero de la timemuloj estas ĉiutage pli limigata, spite al la agadoj de iuj malrespondecemaj elementoj, pretaj perturbi la bonfunkciadon de la kolektivoj.

Neniu pretendos, ke la plej maljunaj generacioj el la popolo akceptas sen timo la novenkondukojn. En la daŭro de preskaŭ I jaro k duono, en kiu oni povis konstati la utilojn de la kolektiva kunvivado, la pensmaniero de la

kampanoj ŝanĝigas k ĉi tiuj konsentas volonte aliĝi al la Kolektivoj, pretaj okupi la labor-postenon k la respondecon, kiu al ili korespondas.

La aliĝoj estas pristudataj atente. Ne povas esti kolektivisto en multaj vilaĝoj, antaŭ ĉio kie estas pli prospera la disvolviĝo de la Kolektivo, pro la kondiĉoj de la riĉeco aŭ pro la pli granda kvanto da grundo, kiu volas, sed kiu indas.

Ĉi tio rilate al la tero. La pri-interŝanĝaj organismoj, de la komerco ĝenerale, ankaŭ en iuj vilaĝoj estas tutece kolektivigitaj, kvankam ekzistas plena libero por la iniciativo de la komercistoj. Tiel kiel ekzistas absoluta libero por la individualisto.

La Kolektivoj estas gvidataj laŭ agmanieroj skrupule demokrataj. Pro tio ili havas aŭtoritaton, kiun ne aŭdacas diskuti iu ol la elementoj —limigita minorito— kiuj sub la ombro de la historia friponeco riĉiĝis kiel lakeoj aŭ instrumentoj de la friponoj, ekspluatante en propra profito k kontraŭ la interesoj ĝeneralaj de la popolo.

La novaj organismoj ekonomiaj por nenio koincidas en tio kion ni povus nomi politika marŝo de la popolo. La Komunumaj Konsilantoj funkcias kun rigora normaleco. Ili konsistigas normalan aŭtoritaton en funkcioj de siaj prerogativoj k mandatoj.

La Kolektivoj pere de siaj organismoj de plenuma tipo, nur okupas sin labori k produkti, levi morale k materiale la vivnivelon de ĉiuj kolektivanoj k priatenti kun malegala fervoro la bezonojn de la revolucia milito.

* * *

Ĉirkaŭ 600 vilaĝoj en la tuta teritorio de Aragonio, fidela al la Respubliko, disvolvas sian aktivecon k rekonstruadon de la riĉeco k la eblecoj de la sama sub la orientado de la Administra Komisionoj de la komarkoj de Aragonio.

La numero de la kolektivoj de U. G. T. k C. N. T. estas 450. La surfaco de la kolektivigita tero superas 70 % procentojn de la tuta libera Aragonio.

La plimulto el la enloĝantoj de Aragonio —pli ol 433.000 — estas kolektivanoj. La numero proksimuma de la kolektivanoj super la tuteco el la enloĝantaro ascendas al 300.000. La subtenantoj de la individua ekonomio, laŭ la tradiciaj manieroj de ĉiu vilaĝo, konsistigas minorion, kiu jam inklina akcenti sian esprimon minorian, vidante, ke ĉiutage elpruviĝas la praktikaj rezultoj de la kolektivigoj.

Ĉi tiu estas la fenomeno, kiun ofertas la realeco de la komarko de Aragonio post periodo de kelkaj monatoj da revolucia milito, fekundige endirektita al novaj realigoj, kiuj sekurigas pli bonan vivon por la laboristoj, por ĉiuj produktistoj ĝenerale k cementas la fundamentojn de estonto prospera k feliĉa. La malnova aserto, ke Hispanio estas lando eminenta individualista k kontraŭa al ĉiu formo de komuna kunvivado forfalas per si mem antaŭ la ekzameno de ĉi tiu fenomeno. La ĵuraj malamikoj al ĉia transformado, la subtenantoj de ordo socia, politika k ekonomia kiel tiu kiu forrenversiĝis pro sia mema diskomponego interna la 18an de Julio 1936, povos dogmigi nur rilate al la rabema hispana individualismo. La proksimeco al la tero, kie vivis k mortis Hoaquín Kosta (7) portas al nia memoro liajn pristudojn super la Agraraj Kolektivoj en Hispanio.

Ĉar tie estas troveblaj la precedencoj k la aŭguroj de la granda fenomeno socia k ekonomia, pri kiu ni okupas nin. La socia k ekonomia superstrukturo perforte altrudita al la hispana popolo ekde la pluraj centjaroj de la cezara k monarkia feŭdismo, kiu estis kiel inkvizitora korsajo por la natura disvolviĝo de la popolaj institucioj k la kreemo

(7) Joaquin Costa, konata hispana juristo k verkisto, kies inteligenteco k erudicio ampleksis ĉiujn branĉojn de la homa kono. Naskita en Monzon (Hueska) en 1846 k mortinta en Graus (Hueska) 1911. Tr.

de la popolo, atingis eĉ nenigi la naturon de la hispana vivo. Ni ne diru ion pri la pensmaniero k la kulturo de nia popolo, savitaj el la fajregoj k la abismoj de ĉiafna malleĝeco, dank' al la oferemo de miloj k miloj da liberaj konsciencoj, malamikaj al la oficiala ortodokseco en ĉiuj rilatoj, en la politika, en la ekonomia, eĉ en la eksteraj miksaj formoj de la vivo.

La Revolucio nuligis la egan bienon k faris ĝin fonto de revoluciaj kreitaĵoj de la hispana popolo, riĉiĝinta per la ekspluatado de la plej bona de nia tradicio k instruita de la eksperimentoj de nova konstruado, realigitaj en aliaj popoloj. K ĉi tie ankoraŭfoje elmontriĝas la karaktero de la hispana revolucio, en ĝies klimata disvolviĝo k en ĝies celoj, en ĝies esprimoj internaj k eksteraj k en ĝies organismoj politikaj k ekonomiaj. Eĉ en ĝies dimensio de universaleco. La Hispana Revolucio ne vidos senkolorigita sian aŭdacan k firman karakteron de Revolucio impulsata de kulturo k civilizacio lokaj. Neniam ĝi perdos ĝin. La libero en ĝies supera kategorio, kiel supera bonaĵo de la homa vivo, konserviĝas k konserviĝos, spite al ĉio, en ĉiuj ĝies kreitaĵoj.

GRAUS

Sub ĉi tiu signo k kun ĉi tiuj karakterizoj la praktikaj realigoj de la hispana Revolucio ofertas en Aragonio, en pluraj vilaĝoj de Aragonio, modelojn, kiujn ni ne timas kvalifiki kiel supertipajn.

Al tiuj kiuj volas ekkoni la fenomenojn de kreado, kiuj okazas en Hispanio, post la komenciĝo de la Revolucio, mi rekomendas, ke ili vizitu Graus. Sen Ciceroneco nek panegiroj. Nur kun siaj okuloj k oreloj.

Dekstre al la vojo, ĉirkaŭ de Graus, la giganta akvujo de Hoakin Kosta reflektas en sia vasta surfaco de verdaj akvoj litografian pejzaĝon de kvietaj lagoj svisaj.

Graus neniam estis dormanta. Vilaĝo laborema k progresema. La ombro de Kosta ĵĉi tie vivis li siajn jarojn de longa studado k de esprimaj songkoloroj por savi la landon, kiun li amis en maniero senorda k grandega. El ĉi ĉio restis en la vilaĝo nur la rememoro k resto de respekto devigata de la prezenco, en la plej bona strato, de la monumento dediĉita al la memoro de la Aragona poligrafo. Aliaj zorgoj pli decidigaj, aliaj stimuloj pli premaj okupigas la laboremon k la menson de la loĝantoj de Graus.

Graus havas 3.300 enloĝantaron. Estis ĉefurbo de partio. Aktuale estas ĉefurbo de la komarko de ĝies nomo, kiu konsistas el 39 vilaĝoj.

Teroj, muelejoj, brutaroj, komerco, transporto, metiejoj, ŝuejoj, birdbridejoj, liberaj profesioj, ĉio estas sub la kolektivaj normoj. La vilaĝo ekonomie estas je servo de la komuna bono k la kolektivaj intereso.

Estas laboro por ĉiuj. Por ĉiuj estas bonstato. La misero, la sklaveco estas eliminitaj el ĉi tiu vilaĝo. Kun ili malaperis la gagrenoj, ĉiuj gagrenoj, kiuj forkonsumadis la energion de la hispana popolo, ĝies kapablon k ĝies ekonomiajn eblecojn k malebligis ekzistadon libera k digna.

En la piedo de la monto, kiu ŝirmas la vilaĝon kontraŭ nordventoj k glitveteroj, la ega fabriko, vera fortikaĵo agresiva k superrega, de la Eklezio, montras sian sonorilejon sen sonoriloj.

Potenca signalilo regulas la vivon de la vilaĝo, la horojn de laboro, manĝado, k ripozo. La sonoriloj, kiuj antaŭe fendadis la eteron de ĉi tiu valo, estas fanditaj por servi la bezonojn de la Revolucio.

La vilaĝo vivas k laboras kun la ambicio perfektigi la kreaĵojn k multipliki la produktadon k utiligon de la laboro por gajni definitive la revolucion. Fera memdisciplino, unuanime akceptata, defendas la komunan bonon. La Komunuma Konsilantaro, konstituita el 9 konsilantoj, la membroj de la Administra Komisiono de la Departemento de la Kolektivoj, la direktivantoj de la Kooperativoj estas la unuaj en la laboro, kiel estas la unuaj en la respondecado. Esti najbaro de Graus estas pano k sekura laboro. Laboro alegra k libero.

Ĉi tiu Kolektivo konstituiĝis en la fino de Septembro 1936. Ĝies riĉecoj por la kolektiva ekspluatado ascendas entute al 2.000.000. Oni komencis kun la decido, ĵaluze plenumata, porĉiigi al ĉiuj kolektivanoj tipon de konsumado sufiĉa sed severa. La revolucia milito imponis ĉi tiun oferon k la kolektivanoj de Graus akceptis ĝin kun la plej bona spirito. La eksperimento estis grandskala. Pro tio estis fiksitaj ne tre altaj salajroj, sed sufiĉaj, ĉar la ekonomia vivo de la vilaĝo k la komercaj interŝanĝoj estis plene kontrolataj.

La 2.000.000 milionoj destinataj por laboro k la bona direktado atingis en la kaso ĝis 2.225.000 ĝis la komenco de Septembro 1937, sen alkaluli la akiron de la rikolto.

En Graus ŝanĝiĝis eĉ la ekstera aspekto sub la kolektiva reĝimo. La surprizo mirigas la animon antaŭ la vido de ĉi tiu fakto. K la demando aperas en la menso de la observanto: Ĉu eblas, ke en la daŭro de 11 monatoj povis kristaliĝi en feliĉa realo tio kio por la laboristaj amasoj de la lando estis sonĝo?

Strato larĝa k pura. La manĝejoj, la publikaj establenejoj atestas pri la nova ero de kolektivismo. La komercistoj laboras komune en Kooperativoj. La razistoj, la ĉarpenistoj, la seruristoj, la transportistoj, la ŝuistoj, ĉiuj estas unuigitaj de la fortaj ligiloj ekonomiaj de la komunaj intereso, de la komuna laboro k de la intima frateco.

—La plej bona el ĉi ĉio estas —oni diras al mi— ke, post la elimino de la friponoj k redukto de ties influo en la destino de la popolo, ni atingis elimini la profesian konkurencon k la enviojn, kiuj en individualista reĝimo oftas la salo, kiu amarigas ĉion. Ekzemple, la tajloroj. Ĉi tie ili ne povis interrigardi sin. La sama okazis kun la razistoj, kun la instruistoj k la kuracistoj. Ni ne diru ion pri la komercistoj el ĉiuj klasoj. Ĉiuj ĉi tiuj estas eliminitaj per la praktikado de la kolektivaj normoj. La antagonistoj en siaj antaŭaj intereso nun fratiĝas en la laboro. En la kunvenoj estas videblaj reprezentantoj en diversaj korporacioj subteni samajn vidpunktojn sen timo k envio. La sama okazas kun la kamparanoj, kun la paŝtistoj, kun la ferforĝistoj, kun la kuracistoj. Ĉiuj laboras k manĝas, k ĉies bezonoj kontentigitaj.

Feraj-vendejo al la Kolektivo. Manĝaj-distribuejo al la Kolektivo. Manĝejo—al la Kolektivo. Forĝejo— al la Kolektivo. Mekanika metiejo—al la Kolektivo. Muelejo—al la Kolektivo.

Ĉiuj esprimoj materialaj, moralaj k ekonomiaj de la vilaĝo estas aglutinitaj al la Kolektivo tutece.

La laboro estas dividata. Ĉiu korporacio en kunveno markas ĝin al ĉiu kolektivano. Oni eble pensus, ke ĉi tiuj

kunvenoj de korporacioj estas klaĉejoj. Ne. Tie oni parolas tre malmulte. Ĉar ĉiu scias sian devon k ne evitas ĝin.

La homoj de 60 jaroj estas liberigitaj de laboro. Komence ĉi tiuj vojaĝantoj al la finiĝo de la vivo marŝis malafablaj antaŭ la aŭdacoj de la junularo, kiu signis plenaryte la kolektivajn normojn kiel devo plenumenda. Ili timis, ke oni intencas ŝarĝi ilin per laboro troa por ties jaroj. Baldaŭ tamen ili eliris el ĉi tiu eraro. La maljunaj ne devas labori. Ĉi tiu estas unu el la unuaj normoj de la Kolektivo. Sufiĉe ili ja estas laborintaj dum sia vivo sub la ciĝo k sub la despotismo de la povhavuloj k la friponoj. La maljunaj ankaŭ ne konsentis, al senokupeco, kun kiu oni pagis ties servojn al laboro konstanta k peniga, kies produkto ne estis por ili, certe, sed en minimuma parto. Tiam la maljunaj en kunveno decidis labori. Necesis laboradi por ne esti ŝarĝo pezega al la ceteraj kolektivanoj k por kontribui levi la vilaĝon el la stagno cele situigi ĝin ĉe la kapo de la produktado inter la ceteraj vilaĝoj el la ĉirkaŭaĵo. Por helpi gajni la revolucion militon la aĝo k la fizikaj kriplaĵoj ne estas ja konsidereblaj laŭ la maljunuloj impedanco. Tiam formis la maljunuloj aŭtentan k emociigan Sturmbrigadon. La vilaĝo donis al ĝi la nomon "Internacia Brigado".

Are iras la maljunuloj al la kamparo por apliki sian kapablon al la laboro.

La malriĉaj estas vivantaj kvazaŭ en songo. K ili estas unuj el la plej firmaj defendantoj de la Kolektivo.

—Kiam la aferoj estas farataj bone—diris al mi unu el ĉi tiuj respektindaj laboristoj—fleksita super la sulkoj de ĉirkaŭrivera ĝardeno—ili bone ŝajnas. K ĉi tie krom ia kolektiva reĝimo alio ne estas videnda.

* * *

Kiam kolektivano decidis edziĝi, oni donas al li semajnon da ferio kun la kuranta pago, por ke li serĉu domon—la loĝejo ankaŭ estas kolektivigita— k oni havigas al li meblojn pere de la koncerna Kooperativo, mebloj, kies val-

oron li amortizas en la daŭro de la tempo sen ia uzuro. Ĉiuj servoj de la Kolektivoj estas disponigataj al liaj bezonoj. Ekde kiam la homo naskiĝas ĝis kiam mortas estas protektata de la Kolektivo, ĝi atentis pri liaj devoj kaj rajtoj, kiujn ĝi fiksis demokrate en la kunvenoj. Ne aperas suspektoj iuj inter la korporaciaj reprezentantoj de malsamaj branĉoj de la produktado. La kolektivano havas ĉion je dispono de la mano. Pano, laboro kaj rimedoj de perfektigado kaj suferado.

La infanoj estas objekto de la speciala zorgo kaj atento de la Kolektivo. Ili ne laboras ĝis 14 jaroj, pro la kialo kaj ekskuzo. Finiĝis la ekspluatado de la infano fare de la memaj familianoj, devigataj en alia tempo plejofte de la mizero forlasi la lernejon antaŭtempe. La patrinoj kaj antaŭĉio la gravedulinoj estas objekto same de speciala zorgo. Ĉi tiuj estas liberigitaj el ĉiu laboro.

La junulinoj laboras en la metiejoj, kie estas kudrataj kaj konfekciataj vestaĵoj por la batalantoj kaj la defendantoj de la revolucio.

La tuta Graus estas laborema kaj abnegacia abelaro, direktivata de la signaloj de la fajfilo, kiu markas la horojn de laboro kaj de ripozo al ĉiuj najbaroj.

Kelkajn horojn mi pasigis, trastudante la pliiĝustigon de la oficejo, de kie estas direktivata la vivo de la Kolektivo en ĝies pluraj aspektoj.

Ĉiu branĉo de la komarka ekonomio estas perfekte pristudata en ĝies disvolviĝo, en la eblecoj de ĝies disvolviĝo.

Kiam la ĝenerala sekretario de la Kolektivo akompanis min al la statistikejo kaj montris la sliparon por informi min laŭ preciza maniero pri la marŝo de la laboro kaj de la ciferoj de la produktado de la vilaĝo, mi ege miriĝis. Ĉio estas laŭsisteme organizita. Ĉiu branĉo de la produktado havas sliparon kun la ekzaktaj informoj pri ĝies disvolviĝo. Tiel nenio malprofitiĝas kaj ĉio atingas la maksimuman punkton de certa kaj reala ordigo. Ĉu sen ĉi tiu rigoreco en

la sistemigo ĉiurilata oni povus fari la gigantan rekons-
truadon, kiun realigis la Kolektivo de Graus? Komprene-
ble ne.

Dank' al ĝi apude de la vilaĝo fondiĝis porkbredejo mo-
dela, kiu ampleksas ĉirkaŭ 2.000 animalojn el diversaj aĝoj
k rasoj.

Estas konate, ke la porko estas en Aragonio, kiel en
multaj lokoj de Hispanio, unu el la bazaj elementoj de la
familia ekonomio. La mortigo de la porko estas hejmeca
institucio de plej antikva deveno.

Kiam venas la vintro ĉiu najbaro el Graus havas porkon,
kiel unu el la bazoj de ties ekzistado. La porkbredejo estas
konstruita laŭ la postuloj de la plej modernaj instalaĵoj.
La animaloj disponas pri duŝoj k ĉiuj atentoj, kiujn re-
ceptas la scienca trakto. Mi demandis la kamaradojn, kiuj
prizorgas la bredejon, de kie ili prenis la modelon. Ili cer-
tigis min sen doni egan gravecon, ke ĉe la entrepreno de
ĉi tiu afero, ili trastudis k diskutis pri pluraj modeloj k
ke adoptis fine nordamerikan modelon, praktikata en la
porkbredejoj de Ĉikago.

En la alia loko en la ĉirkaŭaĵoj de la vilaĝo estas insta-
ligita birdbredejo modela k tre satisfakcia laboratorio de
eksperimentoj. Ĝi okupas grandan surfacon da tereno. Plej
diversaj specoj de dombirdoj svarmas en la bredejo. Ĉir-
kaŭ 10.000 ekzemplerojn penas havi oni por la proksima
aŭtuno. Nun en la pavilonoj de la bredejo trovas sin 6.000.

Ĉio estas nova k brilega. Ĉio estas instalita laŭ postu-
loj de la tekniko k la eksperimento de tiu tekniko.

La direktoro de la birdbredejo inventis novan kovilon
kun pli granda alporto ol la konataj. Milo da kokidetoj
svarmas en la kameroj provizumitaj per varmigilo. Centoj
da anseroj. Centoj da koko k kokinoj zorgeme klasifikitaj.

El ĉiuj lokoj de Aragonio oni venas por preni modelon.
Graus fariĝis pilgrimejo por la Aragonaj laboristo k lerne-
jo de ekonomia k morala rekonstruado de la lando.

Streĉiĝas ĉiuj kreaĵoj de la vilaĝanoj. Funkcias ties bonegaj lernejoj —kun la nomo de A. Kosta— k biblioteko kun katalogo de la plej modernaj temoj el ĉiuj branĉoj de la scienco. La Kolektivo disponas pri presejo k librovendejo.

Oni kreis Lernejon de Artoj k Oficoj, en kiu studas pli ol 60 junuloj de la vilaĝo k ekzercas sin pri la diversaj artaj k oficaĵoj teknikaj.

En la sama Lernejo de la Belartoj k Oficoj estis instalita muzeo de pentraĵoj k skulptaĵoj, same kiel de objektoj kun arta k historia valoro.

Graus prizorgas grandparte la bezonojn de kolonio da rifuĝintaj infanoj kun la instruistoj, instalita en granda palaco kun vasta ĝardeno apuda al la vilaĝo. Ĝi karesas k prizorgas ĉirkaŭ 100 geinfanojn, devenantaj de la militzonoj de Madrido, de la malalta Aragonio k de la aliaj linioj proksimaj al la faŝistoj. Graus subtenas pli ol 100 rifuĝintojn.

Graus staras ĉe la kapo, antaŭ kiu ajn plenumo de la militbezonoj, inter ĉiuj vilaĝoj de Aragonio. Ĝi glatigis siajn vojojn.

Ĝi trastudas la eblecojn pri la ekspluatado de iuj komarkaj zonoj, riĉaj de karbo k pirito. Ĝies industrioj funkcias kun maksimuma alporto interne de la ekonomiaj bazoj perfekte normalaj.

Ĝi konstruis novan muelejon kun supermoderna instalaĵo. Ĝi akiris modernan agrikulturan maŝinaron, inter kiuj elstaras modelo de modernega draŝmaŝino.

Ĝi industriigis la profitadon de la brutaro, transformis, ĝenerale, laŭ la kolektivaj normoj la vivon de la vilaĝo k pretendas transformi la vivon de ĉiuj vilaĝoj el la sama komarko. Ĝi faris la Revolucion.

* * *

El inter la kolektivaj establenejoj de Graus estas ekvidebla granda konstruaĵo, kiu surhavas dikajn k pretendemajn literojn, kiuj indikas, ke tie estas Banko. La Banko

ne funkcias. Ĝies funkciuloj estas en la Kolektivo k laboras tie aktive. El la komuna kaso estas realigataj la operacioj kun la ekstero. Ĝies kredito estas limigita. Certe en la unuaj tagoj de la revolucio detruemaj infangrupoj bruligis iujn dokumentojn de la Banko.

Pli poste iuj domoj k fabrikoj el la pluraj lokoj, kiuj havis komercan rilaton kun la vilaĝanoj el Graus, petis prunton al kolektivanoj. Oni aprobis la peton, k la Kolektivo, pere de sia kunveno, diktis ordonojn nedubebajn, neniel revoluciajn certe, sed, kiuj vidigas la noblecon k la lojalecon de la kolektivanoj el Graus.

Al la certigo de unu kolektivano, al la vorto k la kredigo de unu aragonano solidariĝas liaj kamaradoj-kolektivanoj. Tiel agadas ĉiuj. K la pruntepreninta kolektivano amortizos sian ŝuldon iom post iom k sen perforto. Tiaj estas la kolektivanoj de ĉi tiu bonega vilaĝo.

El ĝies 700 vilaĝanoj ĉiuj estas kolektivanoj escepte de 80.

* * *

Tiel estas multaj kolektivoj de Aragonio. Tamen ni devas juste diri, ke neniu el ili ofertas nivelon tiom alta de perfekteco, kiel tiu de Graus.

Aliaj proksimiĝas en la bonordo k la prosperado de sia marŝo al tiu de Graus: estas tiuj de Binefar, Benabarre, Barbastro, Ainsa, Esplus, Angües, Antiñena, Alcañiz, Hajar, Puebla de Hajar, La Naja, Pollaruelo de Monegros, Fraga, Monzon k multaj aliaj. La vilaĝoj tutece kolektivigitaj en ĉiu esprimo de la produktado k de sia ekonomia vivo estas 350. En la aliaj ekzistas kolektivoj k individualistoj, en miksa reĝimo.

Pli pezas la numero de la kolektivoj pure agrikulturaj k brutarmastraj. La eg-indusrio de Aragonio konsistas el la suker-fabrikoj en Monzon k Puebla de Hajar, kie sub la direktivo de la laboristoj estis normale efektivigitaj la

kampanjoj, per kiuj estis atingita pli granda produktk-
vanto ol tiu de la antaŭaj kompanioj.

La sama okazis en la oleofabrikoj, kies produktado dis-
volviĝas kun plena normaleco interne de la kolektiva orga-
nizo, k same en la et-industrioj pri profitado de la agrikul-
tura k brutara riĉo.

LA VIVO NUN ESTAS ALLOGA

Kvankam estas gravaj la realigoj de la Kolektivoj de Aragonio ĉiurilate, la morala elemento, en kiu ili moviĝas, la klimato de tiuj ĉi kreaĵoj estas faktoro, kiu impresigas profunde la animon de la studento.

En la vilaĝoj, kie la vivo de la Kolektivoj disvolviĝas kun pleja forto k fekunda orientado, ĉesis la politikaj disputoj.

La laboristoj k la etburĝoj, kiuj sumis sin al la disciplino de la vivo k de la kolektiva produktmaniero, forte unuiĝintaj en komuna sorto, en kelkaj interesoj komunaj, realigas la farendajn laborojn kun evidenta gajo, filino de la konvinkiĝo, ke la signo de la nova ero, kiun Hispanio komencis vivi, estas la Kolektivismo, signo k instrumento kiu plugos la bonstaton de ĉiuj, en reĝimo de libero, de justeco k de progreso.

Rezultas kurioza unu el la fenomenoj, kiu estas konstatabla en la vivo de la kolektivigitaj vilaĝoj. La sklaveco k la mizero determinis antaŭe elmigradon de la kampoj al la urboj. Vivi en la kampo k fari la noblajn laborojn de la kamparana produktado ekkonsideriĝis kiel puno k malfeliĉo. Dum la lastaj jaroj ĉi tiu procezo de kamparana elmigrado atingis altan punkton, kiu estis evidenta simptomo de la diskomponiĝo de la kamparana vivo. La kamparanoj forkuris al la urboj el siaj domaĉoj k kabanjoj, el la kampoj, kvazaŭ el loko malbena, ĉirkaŭata de la malsato, de ega malgajeco, de mizero sen porvivaĵoj, k pro la kolera persekutado de la elementoj, kiuj akaparitis ne nur ĉiujn instru-

mentojn de la produktado k la riĉeco, sed ankaŭ ĉiujn risortojn de la ŝtato kaduka, feŭda k maljusta, kiu forkonsumigis per sia premado k maljusteco la konsiderinde kreivajn energiojn de nia popolo.

Ekde kiam la kolektiva vivo estas triumfanta en la vilaĝoj de Aragonio, la procezo de la elmigrado aliĝis en procezo de returno de la elmigrintoj.

La kamparanoj, kiuj forkuris al la urboj, forkurante el la vilaĝoj k el ties malagrabla k malĝoja vivo, regresas rapideme al la hejmoj por aligi sian forton al la Kolektivoj, akcelante la ekstraordinaran k eg-egan entreprenon levi la vilaĝojn k la kampojn el la amaso da ruinaĵoj, morala mi-zero k maljusteco, al kiuj estis subigitaj de la friponoj k la farmistoj.

Ili revenas spertintaj en la urba vivo k decidintaj, ke en ĉiu vilaĝo devas esti establigitaj la minimumaj kondiĉoj de la nuna centjaro. Adaptataj ĉi tiuj sopiroj renovigaj sur la materiala kampo kun la permanentaj elementoj de la civilizacio, kiun nia popolo ofertas, eĉ en la epokoj de la pleja dekadenco, la fenomeno de la morala k materiala rekonstruado de la kolektivigitaj vilaĝoj atingas nesupozitajn realigojn kiel tiuj, kiujn ofertas al ni la Kolektivo de Graus, la plejmulto el la kolektivoj de la vilaĝoj ĉirkaŭ la bordoj de Cinka k tiuj de la Malalta Aragonio.

La kamparo, dank' al la pluraj cirkonstancoj, kiuj koincidas en la grandioza momento, kiun estas vivanta la lando, vidis sin abrupte transformita rilate al la labormanieroj k la tradiciaj instrumentoj, kiuj regis k karakterizis ĝies ekspluatadon. La ekspluatado de la kamparo mekaniĝis grandparte. Por unua fojo la kamparanoj manumas grandskale agrikulturan maŝinaron el la plej modernaj modeloj.

PAROLANTE PRI LA POLITIKAJ PARTIOJ

Ni povus doni iujn ekzemplojn por montri, ke ne en ĉiuj Kolektivoj estas konstatebla sama prospero. Estas vere. Sed estas tre kontentige, ke en pli ol 60 % el ili funkcias bone dank' al la respondecemo, kiu estas konstante observebla, por ke la kolektiviga movado povus triumfi kiel fermentilo de la rekonstruado de la agrikultura produktado kiel finpruvo, ke la kolektivismo konsistigas la priman elementon por la morala k materiala regeneriĝo de la hispana popolo. Oblikva interpreto ne faligas la sistemon, antaŭ ĉio se oni prikonsideras, ke la proporcio de la Kolektivoj, kiuj en Aragonio funkcias satisfakcie konsistigas multe pli grandan numeron ol tiuj kiuj funkcias iel nekontentige ankoraŭ. La kontraŭuloj al la kolektiva ordo montras facilan argumenton, atentigante pri la kolektivoj, kiuj funkcias iom ankoraŭ nesatisfakcie, por diskredetiĝi la sistemon.

Rilate al la Kolektivoj spekulacias ankaŭ la ĉiamaj politikaj agentoj, kiuj en la vilaĝoj ĉiam estas inklinaj maski sian veran signifon k siajn permanentajn celojn sub la etiketoj de la politikaj partioj aŭ de la organizaĵoj, kiuj ne estas karakterizeblaj per sufiĉa respondecemeco. Iuj elementoj de tiuj ĉi partioj parapetas sin en politika organizaĵo unike por uzi la membrokarton kiel tranĉeon por saboti k alsalti la kolektivajn interesojn de la laboristoj k ties afero.

Ĝenerale la principoj de ĉiuj politikaj doktrinoj degeneras kiam devas enkorpiĝi. De la programaj promesoj al la mema plenumo estas longa interspaco. Tion ni vidas ĉiutage. Tiel estas se ĉi tio okazas en la funkcioj de la registaro, en la ŝtatoficejoj kio ne okazus, kiam la platformaj promesoj ekestos objekto de la vigla interpretado de la elementoj, kiuj unue estis radikalsocialistoj, poste de Ceda (8) aŭ de la Radikala Partio k nun de la partioj, kiuj konsideras, ke la rigora kontrolo en ties organizaĵoj estas nekongvena elemento por ties celoj de hipertrofia kreskado? Tiel ekz, okazas, ke la novuloj de la Komunista Partio k de aliaj partioj fariĝas perfortuloj al la kolektivismo sen ke la organoj de la partio, kies doktrinoj akceptas ĝin, obstaklu ilin por silentigi ties langojn k meti mezuron al ties manovroj. Komprenoble la veraj komunistoj sin aligas k kooperas al la normala ekspansio de la prosperado de la kolektivoj. En Aragonio tiaj estas tre malmultaj. Pli oni venis al konfuziĝo en la vilaĝoj rilate al la doktrinoj k la celoj de la politikaj partioj, ol la laboristoj preparas sin tre prudente kontraŭ la terura infekcio de la estreco interne de la vicoj de la partioj proletaj k respublikanaj.

Mi demandis en Graus, en Ontiñena, en la vilaĝoj de la komarkoj de Cinka k en aliaj lokoj, kie la funkciado de la kolektivoj estas plej perfekta, pri la dimensioj k la karakterizoj de la influo de la politiaj partioj en la vivo de ĉiu vilaĝo.

En Graus ne ekzistas politikaj partioj. U. G. T. k C. N. T. en frateca alianciĝo —eĉ ili havas domicilon en sama domo— realigis k daŭrigas la realigon de sia tasko pozitiva k de morala k materiala plibonigo de la laboristoj.

En la lokoj, kie la unueco de la du Sindikataroj estas perfekta, kie la konkordo inter la du organizoj estas koin-

(8) Ceda, dekstra partio, konsistigata preskaŭ ekskluzive el jezuitoj k eklezianoj. Ĝies protagonisto estas Fil Robles (Gil Robles). Poste nesukceso en la balotoj de 16 de Februaro 1936 la partio memlikvidiĝis. Tr.

eida, la politikaj partioj malaperis. En aliaj pluekzistas interne de la Kolektivoj, tiom lojale unuigitaj al la komuna afero de ĉiuj laboristoj, ke kiel aglutinoj de malsameco k timo ili ankaŭ malaperis.

La fenomeno, kiu el la vidpunkto de ĉiu vilaĝo estas grava, estos multe pli tia, kiam ĝi generaliĝos, transpasante la limojn pure lokajn por influi tre decidige al la landoj.

Ĉiuj ĉi tiuj karakterizoj de la kolektiviga movado estas pruvoj konkludaj de la politika matureco k de la kultura k socia supereco de la laboristaj organizaĵoj ĉiurilate.

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESTUDIOS
HISTÓRICOS Y SOCIALES

LA ANTIKVA PLUGILO K LA MODERNA MAŜINARO AGRIKULTURA

La romana plugilo, sen distili konceptojn nek tro literaturi, povas simboli la tutan historion de sklaveco, miopeco k de limigo de la riĉeco k la produktado en la hispanaj kamparoj.

La plugil-tenilo en la dura mano de la kamparano kaligita de la plugado de tero, kiu ne apartenis al li, la erpilo por glatigi la grundon, forkonsumigata de rutina k primitiva ekspluatmaniero, la kondukilo k la bridilo. Ĉi ĉio kun la animo de la kamparano formis tutan simbolon, en kiu egale ĉiuj faktoroj de la romana plugilo estis objekto la barbareca Roma rajto en kies nomo ekzercadis ĉiopovan aŭtoritaton la mastro, la posedantoj de tero, sur kiun elfluadis la sopiroj de la homoj en ties servo. Vane super la malmoderna laborilo falis la insultaĵoj de iuj progresemaj spirituloj. La romana plugilo egale kiel tiu, kiu servis por limigi la linion de la antikvaj urboj k vilaĝoj, plusulkigis la teron, kies tabueca propreco gardis la trikornuloj de la Civila Gvardio, la eklezio k la propraj armiloj de la terposedintoj. La animo de la kamparano estis kiel la mema grundo, kiun li plugadis. Forkonsumita de la mizero k empiria kulturmaniero. Morta de soifo k angoro. Disponigita al la hazardo de la atmosferaj fenomenoj k la necerteco de probablaj prosperoj, sub la lenta kuro de la sezonoj. Pro-

greso sur la kampo? La mano de la mizera laboristo estis pli malkara ol la maŝino. La tradicia senco estis pli forta ol la utiloj. La maŝino emancipigas la homon, ĉar ŝparigas la forton. La maŝino sur la hispana kampo rezultis per-turba elemento de la kutimoj k la feŭdisma ekonomio. Kion faros laboristo pri la tempo pensi pri io kio ne estis la forto de lia mano? K poste lasi lin karakoli pri sonĝoj solvotaj. Ĉi tiu estis la nura motivigo de la posedintoj de la tero, kies ekspluatado apartenis pro tradicia rajto k normo al la mema propeco de la tero.

Kun la apero de la maŝino sur la kampo estas perceptebla la impulso de la trajektorio de la kamparana emancipiĝo. Ne pro sistemigo de ideo, sed kiel respondo de la instinkto de defendo de la sklavo, kiuj en la maŝino vidis, k ne sen fundamento, faktoron de liberigo de la labormano k elimino de la mano de la laboristo el la kampo dank' al la dinamikeco de la maŝinismo aplikata al la Agrikulturo.

Baldaŭ la tero iĝis posedaĵo de kiuj sur ĝies surfaco elporigadis sangŝviton k ploradis amarajn larmojn de sen-espero. La maŝino aperis sur la kampo kiel anstataŭanto de la laboristo, kiel instrumento ne de la privata bonsato, sed de la komuna. La maŝino multekostas. La romana plugilo estas facile akirebla. Sed la maŝino, kiam ĝi funkcias sub la signo de la kolektivo, aliiĝas en decidiga agento por la ekonomiigo de la muskola forto k la potencigo de la laborprofito.

Sur la kampoj de Aragonio la sopira k monotona funkciado de la maŝinaro agrikultura centobligas la forton de la kamparanoj por plialtigi la ciferojn de produktado k fari pli efektivaj la kamparanajn laborojn. Centoj da falĉmaŝinoj rampas laŭ ĉiuj direktoj de la kamparo. La modernaj draŝmaŝinoj ankaŭ kantas ĉe lamalnovaj draŝejoj senutilaj. la kanton de siaj motoroj je ĉiu rapideco. Kelkaj falŝmaŝinoj estas trenataj per ĉevaloj, aliaj per potencaj traktoroj, la samaj, kiuj per aliaj aloj kun la feraj sulkiloj de siaj kra-

doj removas la fedundajn internojn de la grundo en ĝies plej profundaj kaŝitaj zonoj de neekspluatita energio.

La mekanikigo de la kamparanaj laboroj en la periodo de kelkaj monatoj antigis proporcion 150 %. La maŝinoj, kiuj ne povis esti muntataj k fabrikataj en Aragonio, estis importitaj el aliaj regionoj. La hispana proletaro ne nur sopiras al la fabrikado de militaj elementoj, sed ankaŭ al la kreado de elementoj, kiuj plisolidigos, per la kreado de novaj rimedoj por potencigi ilin, niajn rezerveojn por la revolucio k la paco.

Tie estas, en la Aragona lando, la nova k moderna agrikulturo nuntempa. En ĝies centoj da maŝinoj, kiuj zumas sur la kampoj sian triumfkanton.

Ni ankaŭ havas traktorojn. Formacioj de traktoroj k streĉaj traktoristoj, kiuj ilin kondukas al certa celo de la multiplikado de la homa forto. Formacion el 10 traktoroj modernaj mi vidis en la ebenaĵo orkolora de maturaj grenoj de Monegros. Kiu rememoras, antaŭ ĉi brilega spektaklo el falŝmaŝinoj trenataj de tiuj ĉi kolosoj de mekanika forto, pri la primitivaj falĉiloj, pri la plugilo k pri la krado de la romana plugilo, simbolo de sklaveco k regreso? Navegias la maŝinoj sur la grenmaroj, lasante postsignon da garboj. Grupoj da kamparanoj k kamparaninoj klopodas post la maŝinoj en la plenumo de la komisiitaj taskoj. Ili estas gajnantaj ankaŭ batalon. La batalo de la produktado, ne malpli grava ol tiu de la fronto. La batalo de tiuj ĉi laboristoj ankaŭ estas dura. Ardaĵ tagoj post tagoj. Oni ja devas savi la grenrikolton el la krimaj ekskursoj de la faŝistaj aviadiloj, kiuj faligas incendiajn bombojn sur la kampojn. Pli ol du trionoj el la kampoj grensemitaj jam estas rikoltitaj. La greno jam estas en la grentenejoj de la kolektivoj aŭ en la grenejoj de la individualistaj kamparanoj. Alia parto estas apude de la draŝmaŝinoj, kiuj ne ĉesigas sian mekanikan k monotonan kanton sur la kampoj tage k nokte. Kiam unu alterno da laboristoj laciĝas, alia alterno estas preta daŭrigi la laboron. La tempo ja rapidas.

K la futuro konsilas pri finigo de la somerlaboroj por renkonti la bezonojn, kiuj povas prezentigi. La kamparanoj rapidas kolekti la grenon por konservigi ĝin bone. Ĝi estas la pano de ĉiuj liber-batalantoj, estas la pano de la liberigo k la pano de la venko k la libero. Por unua fojo la kamparano ricevas en la kolektivoj la justan prezon ekvivalentenan de sia laboro k de sia klopodo en pano. Li ricevas sian panon k tiun de la familianoj, kiuj batalas ĉe la fronto.

ĈIE STREĈIĜO

Plurfoje, laŭlonge de la Aragonaj kampoj ni realigis niajn informeksperimentojn. Kiel oni pensas? Kiel oni sentas? Kiaj fundamentaj zorgoj obsedas ĉi tiujn homojn, kiujn ekde la naskiĝo ĝis la morto ni vidas klinitaj super la grundo, post la veturiloj kiuj ruliĝas sur la polvoplenaj vojoj, inter la laboriloj k la maŝinoj, kiuj invadis la ebenaĵojn k la altaĵetojn?

En pluraj lokoj ni haltis. De la batalfronto al la postfronto, de la ĉiama luktado de la tranĉeoj al la idilia paco de la ebenaĵoj semitaj de greno k de la frukt- k legom-ĝardenoj.

Ni evitis la barieron da malfidemo de la kamparanoj, de la homoj k la virinoj de tiuj ĉi popolaj medioj. La aragonanoj ne scias kaŝi por longa tempo siajn pensojn nek siajn sentimenton. Kion ili pensas ĝin diras. Sen ritoriko. Sen ĉirkaŭvortoj. Rekte k krude.

Ni parolis kun maljunuloj, kun virinoj, kun gejunuloj. En la kampoj, en plena bolado de febreca aktiveco. Ni kundiĝis kun ili la panon k la vinon, la ideojn k la sentimentojn. Ni parolis pri la kampoj, pri la rikolto, pri la milito, pri la malmoblaĵoj, krimoj, pri la kruelaĵoj k hekatomboj de "ili". (Ili ĉiam estas la faŝistoj.) En la kampdometoj, en la montetoj kun la karbfaristoj k paŝtistoj, en la drinkejoj (la malmultaj, kiuj restas post kiam estis disvastigita aŝiŝo, kie aperas la figuro de drinkulo kun la sekvanta teksto: "Drinkulo-faŝisto, Mallaboremulo-faŝis-

to”), ni esploris la variadon de la profunda sento de la kamparanoj k la plugistoj.

Doni ĉi tie la ekzaktan kopion de la konversacioj estos amplekse, sed ĝi konstituos dokumenton de plej alta intereso por la studado de la transformado, kiu okazis, por prijuĝi la eventojn, la marŝon de la samaj k la uraganon da malkvietiĝo de la hispana popolo en tiu ĉi periodo de dramecaj tempestoj, kiujn ĝi travivas.

De la maljunulinoj, kiuj havas unu piedon en la tombo, ĝis la infanoj, kiuj nin salutas per levita pugno ĉe la krio: Salud (9) ne estas konstatebla simpla diferenco en la ĝeneralaj sentimentoj. Grupoj da kamparanoj junaj (vestitaj per pantalono k bluzo aŭ survesto) laboras kiel homoj sur la kampo en la penigaj laboroj. Oni povas diri, ke ili ĉiam estas laboristoj. Ili ne donis antaŭe, certe, la impreson de fortikeco, de sekureco k de aŭdaco, kiujn nun ili donas en la laboro k en la konversacioj super la problemoj de la kolektivoj k la transformado de la vilaĝa vivo.

Ni konas la malnovan bildon de la hispana kampo, egala al tiu, kiun al ni ofertas la tero de Rif, en kiu la virino, amaso da fizikaj ruinaĵoj, malpureco k ĉifonaĵoj, aperis fleksita super la sulkoj kune kun la viro. La bildo de la Aragona tero havas alian aspekton. La kamparaninoj (vestitaj kiel homoj per survestoj k pantalonoj) ne estas tiuj virinoj el la sudo, kie la normoj de la sklaveco pludaŭras pro la tiranio de la faŝistoj.

En la menso de la virinoj de la vilaĝoj estas kie kun pleja precizo estas konstatebla la ŝanĝo okazinta en la respublikana k laborista Hispanio. Ili estas kun sia decida k solviga spirito la precipaj animantoj de la decidoj en la popularaj kunvenoj rilate al la transformado de la kulturiĝo, labor-reĝimo de la kolektivoj k de la orientado por la savo de la ĝeneralaj interesoj de la popolo. Ili atentis, ke la normoj de justeco k kunvivado establitaj ne profaniĝu pro malforteco aŭ pro laciĝo.

Ili donas siajn filojn alegre al la revolucia milito. Ili stimulas la hezitantajn k la malkuraĝulojn k demaskas la senokupemulojn k la elturnigemulojn. Kun viva entuziasmo ili kontribuas elimini el la vilaĝa vivo ĉiujn prizorgojn malnovajn, kiuj sufokis la vortojn en la gorĝo pro timo diri k konservi ankaŭ kun viva energio la virtojn k la kutimojn de la kamparanaj medioj kun kategorio de valoro moralaj aŭ simple justecaj.

Liberigitaj el la malnovaj zorgoj altruditaj de la tiranio de la klerikalismo, inokulanto de la malnovaj k timigaj superstiĉoj mezepokaj, la vivo de la vilaĝoj ŝanĝis en procezo, kiu ampleksas ĉiujn de la sentimento k de la realeca razonado de la kamparanoj. La virino estas en la avangardo de tiu ĉi transformado. Ĉi tiu procezo, kiu komenciĝis ĉe la restarigo de la Respubliko, akcentiĝis ĉe la eksplodo de la revolucio k la movado por la restarigo de la superaj valoroj moralaj de nia popolo k de la transformado de la superregado de la ekonomiaj fontoj. Ĉiuj tiuj ĉi svarmoj da homoj, hominoj havas en sia memoro, ankoraŭ gravurita, kion signifas reĝimo de premado k malprogreso, k antaŭ la aktuala realo la kontrasto aperas potence kiel supera argumento, kiu ligas tutan epokon por ĉiam forrenversitan. Kia ajn ombro de timo al la estonto estas for de ties spirito. Ili donas la impreson, ke ili laboras por la ĉiamo. Tia estas ties certeco en la decidoj, kiujn ili prenas, tia estas ties diligenteco en la perfektado de la laborsistemoj k la organizado de ĝies pleja profito. Tia estas ties kredo en la venko.

Kun tiu ĉi spirito, kiu estas rekta konsekvenco de la refirmigo en la praktiko de la transformadoj realigitaj de la Aragonaj kolektivoj, la venko de la popolo estas certa. Nenio k neniu ĝin povas forpreni en la milito, en la frontoj de la laboro k de la ekonomio, de la transformado de nia popolo k nia vivo.

LA ARTECAJ VALORAĴOJ -KONSERVITAJ

Eĉ en la plej dramecaj momentoj de la unuaj ŝturmaj inter la popolo atakita de la ribelintaj militistoj k la feŭdulaj kasto, aperis en plej ampleksa esprimo la noblaj zorgoj de ĉiuj, kiuj kun armilo en la mano venkis la teruran fiagon de la faŝistaj militistoj, pri la konservado de la valoroj de nia civilizacio k de nia kulturo. En ĉiuj lokoj de la lando oni vidis kiel la milicanoj savis el la faŝista detruemo la artecajn juvelojn, la valorajn librojn, la majstrajn verkaĵojn de niaj verkistoj k poetoj, la esprimo unuvorte de la hispana kulturo k civilizacio. Sub la direktivado de spertuloj en tiuj ĉi sferoj, identaj plene kun la popolo k kun ĝies maltrankviloj, estis realigita en la tuta Hispanio lojala la savado de tiuj ĉi valorajoj. La artecaj verkaĵoj estis metitaj en bona ordo, zorgante do ne nur pri la plej gravaj heredaĵoj de la hispana popolo, sed ankaŭ pri la permanentaj celoj k solidaro de la universala kulturo.

La popolo de Aragonio, kiel la plimulto el la popoloj de Hispanio, konservis artecajn juvelojn de suma valoro. Ĉe la alveno de la milicanaj kolonoj, kiuj atingis al la Aragona lando por deteni k forpuŝi, poste premi la ribelintojn, iuj homoj, diligentaj k zorgemaj ŝargis sin kolekti la artecajn kreitaĵojn, la valorajn librojn k historiajn objektojn por translokigi ilin al Katalunio. En la preĝejoj k la palacoj estis disitaj, sen katalogi, grandnumero da artecaj

kreitaĵoj. Antaŭ ĉio en Malalta k Alta Aragonio, la malnovaj skoloj de katalunoj k aragonanoj semis siajn plej belajn kreitaĵojn, konservatajn en preĝejoj k konventoj k en la sinjoraj domoj. Ĉiu tiu ĉi riĉo arteca estis katalogita en Barcelono k gardata jaluze en certaj lokoj.

En Aragonio la Konsilantaro pri Kulturo kompletigas aktive ĉi tiun laboron, al kiu kontribuas kun plej granda entuziasmo la komunumaj konsilantoj de ĉiuj komarkoj de la liberigita regiono. Dank'al tiu ĉi diligenteco k zorgemo disponigitaj al defendo de la arteca heredaĵo de la Aragona lando, estis savitaj el la detruado krom pluraj pentraĵoj de la primitivaj katalun-aragonaj pentristoj, pluraj pentraĵoj de Jacomart (10), procesiaj krucoj k aliaj oraj objektoj, inter kiuj distingiĝas kreitaĵoj de la famaj patricoj de Morella k Zaragozo, valoraj teksaĵoj k antikvaj broĉoj, bildoj de Forment k multaj libroj antikvaj de konsiderinda valoro.

En la vilaĝo estas konstruitaj novaj lernejoj. Malofta estas la loko, kiu ne havas bibliotekon kun sufiĉaj libroj por vekigi al menaŭ la ple viglan scivolemon al la problemoj de la klerigo k la kulturo.

La problemoj de la restado de la infanoj en la lernejoj dum la aĝo de la lernado estis solvita. Sub plej severaj admonoj la gepatroj estas devigataj ne doni al siaj filoj laboron ĝis kiam ili scias legi k skribi k ĝis kiam ili ne estas almenaŭ 14 aĝaj. Ne estas ĉi tiu problemoj. Ĉiuokaze, malgraŭ la hispana leĝo, kiu reguligis la devojn de la gepatroj en tiu ĉi senco, ili neniam estis plenumitaj. Ĉar dum la aĝo de la lernado la kamparanoj, devigataj de la mizero aŭ trenataj de la egoismo, irigis siajn filojn al la kampo k donis al ili laboron. Kun granda rigoreco aktuale estas plenumata tiu ĉi devo.

Multaj el la kreitaj lernejoj, dank' al la memaj instru-

(10) Jacomart aŭ Jacome, pentristo naskita en Cadiz 1620, mortinta 1680.

stoj, dediĉas specialan atenton pri la preparo de la infanoj en la pluraj teknikoj.

La instinkto de kreado k perfektado de ĉio kio signifas kulturon k solidararon, tiom vekigita en nia popolo, manifestiĝas en ĉiuj rilatoj. La institucioj de bonfarado multiplikiĝas kiel ankaŭ la servoj de sanigo k speciale en ĝies antaŭjuĝa aspekto. En Kaspe, ekz., funkcias hospitalo, kiu estas samtempe kolektiva manĝejo, kiun mastras la monahinoj de la konvento. La religiulinoj ja aligis sin al la monda vivo kun granda solidaremo kun la popolo, kiu laboras k luktas ne nur en Kaspe, sed ankaŭ en Alcañiz k en aliaj lokoj, kie estis virinaj konventoj. La plej skrupula respekto garantias la privatan praktikadon de ties kredo. Ni parolis kun la monahinoj de Kaspe, k tiel ili al ni konstatis. Neniu ilin maltrankviligis. Antaŭe la kontraŭa. Aliĝintaj el siaj postenoj al la antifaŝista batalo k al la atingo de la ĝenerala bonstato, ili esprimis sian personan satisfakcion k sian opinion por la triumfo de la popolo.

Tiel la solidaremo de ĉiuj firmiĝas en la komuna afero reorganizi plene la vivon de la postfronto por, kun sia perfektigita organizado, prizorgi ĉiuminute la postulojn de la revolucia milito k kiujn ĝi kreas en la hispana socio rilate al la protektado de la infanoj, de la virinoj, de la senigitaj de ajna protektado. Milojn da refuĝintoj subtenas la Aragona popolo, traktante ilin kun vera k nobla frateco. Dum oni estas batalanta en la frontoj, en la postfronto ĉiutage oni gajnas la grandan venkon de atingo al planoj de civilizacio k morala perfektado de la tuta popolo, kiu laboras k luktas k suferas la rigorecon de la barbareco faŝista en-k eksterlanda.

KONKLUDAJ VORTOJ

Ni montris laŭlonge de nia raporto pri Aragonio la aspektojn en ties plej rimarkeblaj reliefoj de la transformado, kiu tie okazas ekde kiam eksplodis la ribelo de la faŝistaj militistoj k, kiel respondo la defenda movado de la popolo.

Ĉe la vido de niaj informoj ĉiuj laboristoj, kiuj sekvis nian eksponon objektivan k serenan, scios eltiri konkludojn. El ili, kiel el tiuj, kiujn formulos kiu ajn honesta observanto, li eltiros sendube la profundan konvikon, ke en Aragonio estas atingata grandiozan faron. Oni ja renkontis la plej durajn postulojn de la revolucia milito k realigis la transformadon de la vilaĝoj de la urbo, kiu estas la fundamenta pravigo de nia batalo. Oni faras la militon. La konkeroj de la Revolucio estas en marŝo al fekunda k plena realiĝo. Kiuj subtenis la teorion, ke la Revolucio nenion komunan havas kun la milito, antaŭ nia pledo, devis suferi, almenaŭ, etapon da dubo.

Post jaro k duono da milito, post ege da sangoferoj, heroeco k klopodo, sindonemo k konscio de la labristoj rilate al siaj klasintereso, rezultas tre stranga la fakto, ke oni ĵetas super la kreitaĵoj k la organizo de la laboristoj tutan amason da intencaj legendoj, kiam pro krimaj ekscitoj estas detruataj la sekuraj bazoj de la emancipiĝo de la proletaro tie, kie ili jam estas firmigitaj.

Komparataj la realigoj de la burĝaro k de la feŭdularo dum la centjaroj da tuteca superregado de la lando, kun la kreitaĵoj faritaj de la laboristoj en la daŭro de jaro k du-

no en la senco de la organizado, moralo k laboremo, ankaŭ en sia efektiva profito, montras ĉi tiuj lastaj egan supe-recon.

Inter la tuta transformado realigita de la laboristoj, tiu, kiu en Aragonio marŝas al sia destino de kontinuaj superoj estas aparte rimarkinda. Ĝi ja estas faro de la Aragona popolo, de la Aragonaj laboristoj reprezentataj de la Konsilantaro, tuteca esprimo de la Aragona popolo, ĵaluza gardanto de tiu unuanimeco antifaŝista, kiu kreis la senmortan spiriton de la gloraj tagoj de Julio 1936.

EPILOGO

I

Spite al la perfidaj kampanjoj, direktataj rekte kontraŭ la interesoj de la laboristoj cele senartikigi ties kreitaĵojn k nuligi ties mastradon super ĉio kion ili per sia sango, oferoj k klopodoj konkeris dum jaro da heroeca batalo, la vero de Aragonio estis, nek pli nek malpli, ol la eksponita en la antaŭaj ĉapitroj.

Kontraŭ tiu ĉi vero, kontraŭ ĝies signifo k ĝies vasta transformiga skalo lasttempe direktiĝas la aktiveco frakasiga k malrespondeca de araĉo da provokantoj karakterizablaj per malsamaj politikaj etikedoj, por senhonorigi k detruu ĝin.

Diversaj manovroj, kvankam kun koincidaj celoj, aktivas kontraŭ la kreitaĵoj de la Aragona popolo k kontraŭ ĝies Konsilantaro.

En la enlanda plano produktiĝis faktoj negativaj de plej konsiderinda signifo por la normala marŝo de la milito k la revolucio al ties certaj venkaj realiĝoj.

Ni analizu ĉi tiujn faktojn.

II

Ekde 20 de Majo 1937 okupas la Povon registaro de tipo minoria, de kies formacio estas forpuŝita, kun preteksto de diversaj motivoj konfuzaj, la partopreno de la reprezentantoj de la du grandaj sindikataroj laboristaj U.G.T. k C.N.T.

La kompakta bloko de ĉiuj popolaj fortoj, disponante

pri plej grandskala oferemo, kiu savis la landon en plej malfacilaj tragikaj momentoj, estas, sen pravigo, disigata de la provokoj k la malklaraj aktivecoj de politikaj grupoj, kies privata ambicio kontraste al la postuloj de la aŭtentaj, honestaj k permanentaj interesoj de la popolo, penas altrudi per verdiktoj privatajn orientadojn k metodojn, okazigante per tio katastrofajn damaĝojn al la supera intereso enlanda en ĉiuj ĝies aspektoj.

La registaro de Largo Kabaljero, eliminata el la Povopere de intrigo k mallojaleco, en la monatoj de sia mandato, atingis starigi sur la turniĝo de la dramecaj okazaĵoj la novajn instrumentojn organizajn k disciplinajn por renkonti la batalon k malfermi la vojojn de la venko al la armigita popolo. Estis kreita k organizita la Respublika Armeo sur la bazo de la gloraj Popolaj Milicoj. Pri la efiko de tiu ĉi organizo k de la heroeco de la nova Armeo konfirmis la nevenkebla rezistado de Madrido, kie koncentriĝis krom militista kadroj el la antaŭrevolucia reĝimo devenantaj el la plej diversaj lokoj de la lojala zono, la tuta militmaterialo, kiu estis kunigebla, uzante la plej nekredablajn procedmanierojn. Ili proklamis ankaŭ la evidentan komenciĝon de la kulmino de la afero, la glorajn venkojn sur la malfermita kampo de Ĥarama, sur la tero de Guadalahara, en Almaden k en Pozoblanko super la germanaj k italaj divizioj, aktivecoj kiuj havis universalan resonancon k kiuj pruvis antaŭ la mondo la kapablecon por la venko de la hispana popolo. La influo de tiuj ĉi aktivecoj triumfaj en la eksterlando estis konsiderinda. Ĝi determinis, en la momento, se ne la ŝuldatan helpon, almenaŭ la respekton al nia afero flanke de la popoloj k la registaroj nomataj demokrataj. K ĝi konsistigis la potencan panaceon, por stimuli la konfidon de la monda proletaro en la venka futuro de nia batalo. Ankoraŭfoje pruviĝis la firmiĝo en realaĵo de la aksiomo, ke la revolucia armeo de unu popolo venkas ĉiam dum la motoro de la batalo estas la revolucio k la firma decido venki aŭ morti.

La registaro de Largo Kabaljero konformigis la organizadon de la postfronto sur la bazoj de disciplino sen perdi iam el vido la atenton ŝuldatan al la novaj realoj kreitaj de la revolucio k la milito. Ĝi subtenis kiel fonton de sia aŭtoritato k de sia prestiĝo la unuecon de la tuta popolo en la batalo k en la aktiveco de la tuta lando. La plimulto en la formacio de tiu ĉi registaro de la aŭtenta k rekta reprezentado de la organizitaj laboristoj estis firma garantio por la lando, ke neniukaze, dum la registaro de Largo Kabaljero restus en la povo, kurbiĝos la linio de la enlandaj okazaĵoj pro saboto k perfido, nek en la marŝo de la milito bremsata de eksterlandaj alvokoj, en la finigo de la transformado iniciatata en ĉiuj tavoloj de la enlanda vivo, malakcelata de bremsoj de sama origino. Ne estis malpli grava por la laboristaj amasoj la sekureco, ke neniu grupo de kiuj formis la antifaŝistan blokon, aŭtenta esprimo de la popola unuanimeco, altrudos sian privatan tendencon kontraŭ iu el la sektoroj, kiuj disponigis sian forton k la heroecon de siaj homoj al la entrepreno por la liberiĝo de nia popolo.

Malgraŭ tio, ĉiuj realaĵoj estis forgesitaj k oni okazigis post la manovro de mallojaleco k de ambicioj de grupoj k personoj senmandataj, kiu prezidis la aperturon, la disvolvigon k la solvon de la krizo de Majo al la registaro de doktoro Negrin, sed efektive direktivata de Indalecio Prieto. Ĉu estis nur personoj k baraktantoj por la hegemonio de grupo kio en tiu ĉi krizo ventoliĝis? Ne. Ventoliĝis problemo de plej konsiderindaj dimensioj.

Sur du supozataj postuloj baziĝis la konstituiĝo de la nova registaro minoria, kies agado saltas inter la ekzercado de nekonfesata diktaturo k la konstanta frakaso. Ĉar ja ĉi tiu estas la signo de ĉiu registaro, kiu en malfacilaj horoj por la lando, formiĝas sen interpreti nek reprezentante amplekse la emociion, la sentimenton k la volon de la popolo en sia pleno.

La unua pretendis adopti la formacion de nova regis-

tara ekipo, prikonsiderante la bezonon priatenti kelkajn supozitajn k neeviteblajn akcentojn, per kiuj la ekstero premadis super niaj decidoj, akcentoj, kiuj petis k eĉ postulis, ke la socia k ekonomia transformado de la lando retroiru al la "statu quo" kaduka de la 18 de Julio, dato, en kiu la defenda k ofensiva agado de la popolo forigis por ĉiam unuordon, kiun la faŝista ribelo akcelis al definitiva ruiniĝo, samtempe malfermante la pordojn de futuro por realigi la bezonegan reorganizadon en ĉiuj flankoj de la enlanda vivo; kiu garantiu la publikan pacon k la liberajn determinojn de la ŝtato sen ombro de interferoj k akcento de la intereso de la feŭduloj, militistoj, de la eklezio k de la plutokrato —de la burĝaro unuvorte— kiuj ĝis tiu momento havis proprigita al si la Respublikon, same kiel la efektivan submetiĝon de la personoj k intereso al la konstitucia leĝo k speciale al la postulatoj, kiuj premias socian progreson k profundan transformadon rilate al la riĉo k la ekonomiaj fontoj pro sociaj utiloj k al kiuj ĝi establas kiel superan hierarkion de la civitana rajto la Laboron.

Kiom pri la supozaj akcentoj internaciaj k ties stimuloj al la senkapigo de la marŝo de la Revolucio al ties destinoj —prezo, kiun ĝi verŝajne postulis pro certaj helpoj— en la daŭro de la tempo de nur 4 monatoj oni povis konstati kia estis la rezulto de la submetiĝo al la ekstero, se efektive tiaj postuloj de submetiĝo k oferoj al strangaj voloj ekzistis en iu konturo, klare k precize formulitaj.

Eĉ minimume ne ŝanĝiĝis nia drameca situacio de izoliteco, kiun ebligis la profaniĝo de la Internacia Rajto k la abomeninda inhibicio de la kompromisoj, kiujn kun la Hispana Respubliko havas aliaj ŝtatoj, malgraŭ la konstantaj alvokoj de nia popolo al la universala konscienco k malgraŭ la plurfoja apero de niaj diplomatoj antaŭ la pordoj de la Kancelarioj de tiuj ŝtatoj, kiuj en nia milito havas, se tiom, almenaŭ konsiderindajn interesojn defendi. Super tiu ĉi ekstremo, super tiu ĉi panoramo da malsuk-

cesoj k fiaskoj ne estos superflue aldoni al la dolora plendo de la popolo la sarkasmon de la prikonsidero, ke oni penis dormigi k letargiigi ĝies fidon en si mem k ĝies impeton por alfronti la invadantajn armeojn k por defendi la konkerojn de la Revolucio, kiujn per sia sango ĝi atingis, por tiele akceli la disvolviĝon de certaj kontraŭrevoluciaj stimuloj, ĉu devenantaj el la ekstero, ĉu en la interno, animata de politikaj prikonsideroj favoraj al certaj grupoj inter kiuj certe ne sin trovas la organizitaj laboristaj amasoj.

La postuloj al la stariĝo de socia k ekonomia disciplino, bezonega aliparte, ne estis plenumitaj kun pli bona fortune. La registara bloko facile enfalis en gravan eraron, konsiderante kiel malutilan —k eĉ faŝiston— al la bezonega disciplino ĉiun kiu blindece ne submetiĝas al ĝies verdiktoj k al ĝies privataj interesoj. Eĉ “obeidon ĝismortan” oni atingis postuli al ĉiuj civitanoj el la kolonoj de la oficialaj gazetoj. K ĉi tiu konduto, kiu estas komprenigebla kiel decido pliiĝi la fortunon k la aŭtoritaton de la Povo interne de natura klimato ellaborita de la varieco de la kurentoj —la pluraj kurentoj de la Revolucio— estis makulita de la ekzercado de nekvalifikeblaj persekutoj pere de kiuj oni atingis precize malajn efektojn ol kiujn oni pretendis atingi. Oni persekutis k penis neniigi organizaĵojn k homojn de tre elpruvita antifaŝismo tial ke kontraŭas al la senordo, senpoveco, al la konfuziĝo k al la kontraŭrevoluciaj provoj, en revolucia pozicio k tial ke ili firmigas antaŭ dogmecaj altrudoj k perforto de partioj k grupoj, la sentimenton de unueco de ĉiuj laboristoj k de la tuta hispana popolo revolucia por gajni la militon sen intervenoj fremdaj al niaj propraj interesoj k kun la egaj oferoj, kiujn ĝi necesigas por solidigi la bazojn de la definitiva emancipiĝo de nia popolo por la estonto. Terura estis la eksperimento k neanticipita la rezulto pli malgranda. Dum la tuteca zorgo de la registaro koncentriĝis en la detruado aŭ en la disigo de la kadroj senerare anti-

faŝistaj k aŭtente revoluciaj, la faŝistoj, kiuj tiom abundas en la postfronto, plikuraĝigitaj de tiuj ĉi faktoj, duobligis siajn intrigojn k siajn konspirojn eĉ ĝis la grado meti en grava risko la sekurecon de la hispana popolo.

III

Post kelko da monatoj dum kiuj la neretenebla forto de la Revolucio eksplodis en pluraj agoj, kiuj savis la landon el la faŝistaj ungegoj, nova strukturo, nova sentimento de disciplino civitana formiĝis sub la revolucia signo. Nova ordo stariĝis. Nova ordo, kiu estis la antitezo de la malnova ordo.

En la socia biologio, jam estas sciate, en la instanco, en kiu plifirmiĝas unu transformado, eĉ ne tre energia, unu Revolucio, kiom ajn grandaj k noblaj estas ĝies signo, ĝies kioloj k ĝies ambicioj, aperas la kontraŭrevolucio, kiu mordas ĝies kalkanojn. Nedecidemo, profaniĝo de la revolucia spirito, eraro, cedo aŭ perfido preparas ĉiujn vojojn al la kontraŭrevolucio. Niakaze, antaŭ la volo de la popolo, antaŭ la agitvortoj de la laboristaj amasoj, antaŭ ĝies afero k ĝies konkeroj, de post la unuaj monatoj bolantaj de bataloj sur la stratoj, en kiuj la sana furoro de la rekta justo de la popolo subigis kun dura pugno, ĉe la senagado k la inerto ŝuldataj al la Respubliko, la faŝistajn k faŝistemajn fortojn, ĝenatajn en ties interesoj k en ties egoismo de la realigataj transformadoj, la kontraŭrevolucio levas la kapon k etendas tra la tuta lojala zono siajn fadenojn de intrigoj k detruiva plendo, sian detruan agadon, pli aŭ mapli kaŝa k en multaj kazoj pure aroga k provokema.

En revolucia procezo de nia tipo (kiel en ĉiuj) la sentimento de la kontraŭrevolucio nur aperas k aliĝas en agado k la reakcio de la klasoj k individuoj rekte ĝenataj de la moralaj k materialaj interesoj de la revolucio, sed eĉ en la memaj vicoj de la nomataj revolucianoj, kiam la mensoj de tiuj ĉi ne estas disciplinataj en la klara kompreno pri la rimedoj k celoj, kiujn ili devas uzi k plenumi,

la kontraŭrevolucio kreas inklinojn specife kontraŭrevolucion. K tio okazas laŭ specifa maniero en la mema menso de tiuj revolucianoj teoriemaj k simple puŝataj de la kurento de la revolucio, de sia flegma pripensmaniero aŭ de sia temperamento, farante ilin la plej danĝeraj kontraŭrevolucianoj k la plej bonaj helpantoj al la kontraŭrevolucio.

Eblas produktiĝi, ĉe la ĝeneraliĝo de la influo de la kontraŭrevolucio, interne de la procezo de revolucio, zonoj de opinio k speciale de intereso, jam privataj aŭ de kastoj aŭ de politikaj grupoj, kio estas tre malfacile liberigi ilin el la klasifiko de kontraŭrevolucianoj. Kiuj ajn estas ties nomo k ties etikedo, la agadoj de tiuj, kiuj en inter ili moviĝas, denuncas ties karakteron. Tiele ni povis konstati kiel apenaŭ disvastiĝis la konvinkiĝo, ke la revolucia kolero de la popolo estas cedinta en intensivo k ke la malleviĝo de la sama al la normoj de disciplino, kiun la mema popolo kreis, komenciĝis, ĉiuj homoj, aliĝintaj al la kontraŭrevolucio, ĵetas sin al konkretaj agoj kontraŭ la kreaĵoj k la intereso de la revolucio. Venas tiam la ekstremoj de skandalo, de plendoj, de konfuziĝo k la malakordaj voĉoj, kiuj disŝiras la vestaĵojn, se la blindeca forto de la popolo faris nur solan maljustaĵon (ne pli malgranda savi ĉi tiujn elementojn el la skaveco de la faŝismo). K tuj oni ekintrigas per ĉiuspecaj kalumnioj k insultoj kontraŭ la popolo k kontraŭ ĝies agoj k revoluciaj aŭdacoj. En tiu ĉi ofensivo partoprenas kun pleja intenco de forto tiuj kiuj eble ŝuldas al la grandanimeco de la aktoroj de la revolucio sian propran supervivon fizikan.

Kvazaŭ tertremo ne okazigas terurajn plagojn k la plej tristajn destinojn inter la homoj k la aferoj, super kiuj la influo de la sisma supercentro malŝargas sian furion naturan. Kvazaŭ rivero elbordiĝante aŭ tempesto ĵetante el la dorso de siaj ondoj la ŝipojn kontraŭ la sablaĵoj k la dezertaj plaĝoj, ne generas destinojn de maljusteco k detruado. Do tiel estas la Revolucio, eĉ kiam, kiel en la nia,

la proverba nobleco de la popolo estas erarinta en senpripensoj k misagoj, kiuj tre kostas al ĝi k kiujn oni enspezos al ĝi eĉ kun plej granda uzuro en la futuro.

Dum daŭras la ŝturmoj de la revolucia milito, bandaĝo da ekzaltiĝo k heroeco, kiu perdigas la instinkton de la konservado, blindigas la amasojn. De tiu ĉi blindeco profitas la kontraŭrevolucio por starigi sian defendon por munti siajn intrigojn por alproprigi al si ruze la decidajn risortojn de la forto k de la povo publika k ekonomia por establi la firmajn bazojn de la batalo kontraŭ la aŭtentaj revolucianoj k kontraŭ la kreaĵoj, kiujn kun sia ofero k sia sango ili atingis.

La simptomologio de la kontraŭrevolucia antaŭenmarŝo en la lastaj 8 monatoj ŝajnas tre riĉa de pluraj faktoj.

Nur ekrigardo al la ekzameno de la eksteraj esprimoj de la kontraŭrevolucio, ofertas la enlanda panoramo kazojn de skandala k akra signifeco kontraŭrevolucia. La faŝistaj "komplotoj" okazas apogataj de la kanajlaj kunkulpecoj de embuskitaj homoj en la plej delikataj organismoj de la ŝtato, la "kvina kolono" (11) organizis militmaniere siajn efektivojn —k tio estas publika—, tial ke la memaj aŭtoritatuloj rimarkigis en oficialaj notoj pri la skalo k la vasteco de tiuj ĉi intrigoj, eĉ ĝis la grado krei fantasma armeon interne de nia propra armeo, en la ministerioj, en la organoj de la administracio de la Justeco, en la institucioj ŝarĝataj pri la subtenado de la publika ordo k de la defendo k la sekureco de la lojala postfronto, en la espero de la supera perfido en la plej gravaj momentoj, kiuj povas superveni nin, kiel okazis en Bilbao k en Malago. Kiel okazis laste en Santander.

Ĉie moviĝas la perfiduloj k etendas siajn komplikigajn retojn k siajn influojn, iuj delikataj, aliaj akutaj k krudaj.

(11) Quinta Columna. Ĉiu embuskita faŝisto apartenas, laŭ la antifaŝistoj hispanaj al la "quinta columna". Ĝies deveno estas neneekkoninda. Kiam 4 faŝistaj kolonoj atakis Madridon senrezutel, la faŝistaj radio-stacioj diskonigis, ke la kvina kolono, kiu sin trovas en la mema Madrido, decidis ties triumfon, t. e. la konkeron de Madrido. Tr.

Dume homoj, kiuj proklamas sin revoluciemaj k identaj kun la popolo k kun la afero de ĝies libero k de ĝies emancipiĝo, rigidigis siajn kampanjojn de ekscitoj al la registaro, pretekstante per pluraj motivoj, por ke ĝi procedu al la senartikigo de la revoluciaj organoj de pruvita lojaleco, por ke ĝi senarmigu la popolon k fiksu ĉiujn faktorojn negativajn, kiuj en pura opozicio al la triumfo de la revolucio k la milito, agitiĝas en la tuta lojala teritorio en la mezo de la plej neaŭdita senpuniteco k sen la publika povo apliku la ŝuldatan energion por fortranĉi tiom da misagoj.

Oni ekzercadis la perforiton de la publika forto, viktimo de la intrigoj, kiujn ni aludis, kontraŭ la popolo, kontraŭ la laboristaj organizoj, fortike enradikiĝintaj pro sia historio k sia konduto aktuala en la popola konfido. Anstataŭ subteni la entuziasmon en la amasoj, por ke ilia batalema tensio k ilia revolucia spirito no defalu, oni realigas politikon frakasigan, kiu ŝajnas tendencas fari la eblan por estingigi la fajron de la entuziasmo en la spiritoj, kiuj plej profunde gardas sian varmon. Tiele oni fomentas konscie aŭ nekonscie, la spektaklon, kiun jam ofertas la vilaĝoj k la urboj, kie la malnovaj politikaj k ekonomiaj fortoj, reprezentataj de la tradiciaj friponoj k siaj konstantaj kunlaborantoj, ree direktivas sian ofensivan agadon kontraŭ la laboristoj, kiujn pro la artifiĝo de la intrigoj k de la politika korupteco oni eliminis, perforte piejofte, el la postenoj de la direktivado de la publikaj aferoj la samaj, kiuj kun la armiloj en la mano, en la plej heroeca periodo de la Revolucio, alsaltis, por defendi de tie la respublikan lojalecon kontraŭ ĝies malamikoj, kiuj estas la samaj malamikoj de la laborista klaso, senaktivaj k senrespektemaj sen ekskuzo al la ĝeneralaj interesoj de la publika sekureco k paco.

Ripetiĝas la procezo, kiu disvolviĝis ekde 1931, post la proklamo de la Respubliko. La friponoj k la potencaj faŝistoj, kiuj konstituis en la vilaĝoj kun la Civila Gvardio

k la sovaĝaj reprezentantoj de la Eklezio, la superajn rezervojn —kiuj neniam frakasis— de la nigra reakcio, ekrapidis, apenaŭ pasis la bolo de la unuaj monatoj de agitado. por maski sian signifon k sian permanentajn celojn, same kiel sian agadon decide kontraŭrevolucion, kun la protektado de determinaj partioj, kun kies senkonscienco, en kazoj proksimaj al perfido, k kun kies karto ili povis tiam fariĝi ankoraŭfoje agentoj de la plej nekonataj persekutoj sangaj kontraŭ la laboristoj k sabotantoj de la interesoj de tiuj ĉi k de ties kreaĵoj.

La fortoj de la Publika Ordo famaj en la kampanaj zonoj pro persekutoj k pro ekscitoj tute administrataj de la reakcio k ĝies gardantoj, elmontras en siaj prizorgoj k en la kieloj de sia agado la danĝeregan renaskiĝon de la malnova spirito antilaborista, kiun la Civila Gvardio famigis dum la longaj jaroj de barbareca regado k de maljusteco subtenata kiel sistemo de premado kontraŭ la persona digneco k la rajto de la humilaj.

La Administracio de la Popola Justo, metita en la manoj de la plej nigra reakcio, difektita de zorgoj k alvokoj al kompromisoj malfacilaj forpuŝitaj de la karaktero k la persona reprezentado de kiuj devus gardi la severan aplikadon de siaj mandatoj, aliiĝis, pere de serio da ordonoj k disponigoj de efektoj perfekte prikalkulitaj antaŭe, en instrumento de kunlaborado, kiun povus deziri Franko k liaj kunkulpuloj, kiel provokanta agento en nia postfronto. Anstataŭ persekuti la spionojn k la perfidulojn k insisti kun duobligita kuraĝo ĉiutage, ke la departementoj ŝarĝitaj pri la publika sekureco agadu energie kontraŭ la unuj k la aliaj, oni sin donas al la tasko procesi la meman revolucion k la revolucianojn, kiuj pleje distingigis en la premado de la faŝismo en la unuaj tagoj. Dum la deklarataj faŝistoj, la perfiduloj k la spionoj, ĉiuj embusitoj, kiuj rampas ĉie, minacas serioze per siaj intrigoj ĵeti nin al la vojoj de la fiasko k nenigi la popolon pere de transdono al la malamiko de nia teritorio en la plej malfacilaj mo-

mentoj de nia milito, kiel okazis en Bilbao dank' al la konfuziĝo sen nomo de la agado de la homoj, kiuj en ĝies trاندono k ĝies perfido, klare farita, partoprenis, kiuj ĉiumomente rifuzis, inkluzive per la forto, la intervenon k la gardostaron de la aŭtentaj laboristoj pri ties malklaraj aktivecoj, eĉ ĝis tia grado, ke oni povas certigi, ke la falo de Bilbao ŝuldas precipe al la antilaborista karaktero de kiuj partoprenis k direktivadis ĝian defendon: la et- k grand-burĝaro de Baskolando.

Io analoga okazis kun la falo de Santander, du eksperimentoj ekscese doloraj, por ke la instinkto de la konservado de la registaranoj k de la hispana popolo ne sentu sin forskuita de la plej akuta alarmo.

Antaŭ ĉiuj tiuj ĉi negativaj elementoj por nia batalo k antaŭ tiu ĉi kontraŭrevolucia fermentado, venis la registaro prezidata de doktoro Negrin. La konfuzaj certigoj, kiuj proklamis la ekziston de internaciaj premoj, kiuj devigis disigi la laboristan klason el la direktivado de la ega entreprenado enlanda, orientigi la sintenon de la registaro, starigi la rimedojn bezonajn por la milito k disciplini la vivon de la postfronto super la plano de la transformadoj okazigataj en la lando, estis la unika motivo por ke la nomita registaro kapti la risortojn de la Publika Povo.

La politikaj grupoj reprezentataj en la registaro de Negrin sciis, ke ili reprezentis nek la laboristajn amasojn nek la interesojn de la Revolucio. Necese, por pravigi sian ĉeeston en la Povo, ili devis adaptigi la politikan regadon k la direktivadon sur la bazo de intereso k personoj reprezentantoj de aliaj intereso opozicie al la aŭtentaj intereso de la laborpopolo, la sama, kiu savis en la unuaj monatoj k en la sekvintaj ĉe la eksplodo de la milito, la landon k la reĝimon, sen escepti la klasojn de la et-burĝaro k de la et-komerco, el la sklavigaj ungegoj de la faŝismo, la sama, kiu estas savanta k savos definitive la landon el la dura fazo, kiun la milito prezentas.

La registaro limigis sin metiĝi antaŭ la kontraŭrevolu-

cio, eble kun la decido k kun la kredo noblaj, ke ĝi povos submeti ĝin al disciplino k en donita momento sufoki la ekspansian forton de ĝies plendoj k ambicioj. Pli grava estas la fakto, pri kiu ni rimarkigas. Gravega fakto. Danĝere ja estas alproksimiĝi al la kontraŭrevolucia deklivaĵo, kiam la Revolucio estas viva k potenca en la postfronto k en la frontoj. Danĝere por la registaro k por la lando, por nia definitiva afero.

Ĝis kiaj limoj ĝi atingos? Jetita al tiu ĉi krutaĵo ne estas anticipibla la fino. Car de la sama maniero kiel la revolucio k la aliĝo al ĝies servo kunligas volojn k hipotekas kondutojn por la futuro, la kontraŭrevolucio faras la propran. La eksperimento de la Radikala Partio k la aktivecoj de Alejandro Leroux (12) interne de la politika k socia procezo ĉe la proklamo de la respubliko, devus esti edifa por ĉiuj homoj k partioj.

En la aktualaj okazaĵoj ekfloras simptomoj analogaj al tiuj kiuj karakterizis tiun procezon de valorigo de ĉio kio havis kontraŭrevolucion signon aŭ reaktan kredon interne de la Respubliko, kiu enfluis en la aktuala milito post trapaso de Oktobro 1934. Alia estis la situacio de Hispanio tiam. Suferis ankaŭ la lando la konsekvencojn k la angorojn de surda milito sociala, sed ne estis milito kiel tiu kiun en la aktuala ni alfrontas. Pro tio la danĝero de la devioj k la fortaj turniĝoj al kontraŭrevolucia direkto konsistigas pli grandan gravecon k estigas pli akrajn alarmojn.

En la kalkulo de analogioj inter tiu k la aktuala pro-

(12) Alejandro Leroux, politikulo, kiu komence de sia politika agado distingigis kiel energia revolucionario, sed pli malfrue senteble kliniĝis al la dekstreco k dum la lastaj jaroj ludis komplete reaktan k kontraŭrevolucion rolon. Antaŭ la balotoj de 14 de Aprilo 1931 li, por akiri la simpation de la popolo, ellaboris tre revolucion programon, sed ĉe la proklamo de la Respubliko li prenis la flankon de la reĝo Alfonso 13 k pledis por li. Ĉe la eksplodo de revolucio de Oktobro 1934 en Asturio Leroux ebligis la iron de generalo Ochoa, kiu kun la helpo de multnombraj marokanoj frakasigis la movadon, farante amasan masakron de ministoj. Li mortis antaŭ 2-3 monatoj en Francio.

cezo elmontrigas la unua realo faktojn kiel tiuj: identas la apelacioj al la neceso atingi enlandan unuanimecon kun la aŭtenta proletaro al ĝies servo, trankvile submetita el la subaj funkcioj, kiujn oni konfidas al ĝi kiel eliminata el la superaj organoj direktivaj de la lando. La Respubliko, onidire, devis esti regata de la respublikanoj. Aplikiĝis al praktiko ĉi tiu laŭprograma postulato. Aliĝis al la respondecoj de la Registaro la Socialista Partio kiel amasoj. La unua kiel aliaj estis artifice eliminataj el la partopreno en la Povo. Nun ne nur al la socialistoj en ties aŭtenta reprezentado revolucia kiel laborista, sed ankaŭ al la milionoj da aliĝintoj de la C. N. T., kiu kun siaj efektivoj, same kiel ciferata en milionoj, de U. G. T. estas nepridiskutebla plejmulto de la lando, en la batallinioj kiel ĉion oni obstaklas, por ke ili ne influu laŭ decidiga maniero en la marŝo de la enlandaj okazaĵoj el la postenoj de la registaro, detruante tiele la plej bonajn kiel sekurajn eblecojn de nia sukceso en la milito kiel en la transformado de la lando je servo de la revolucia milito, kiel la demokrata principo de la subigo de la minorioj al la volo de la plimulto.

Identas la procedmaniero doni eniron en la vicajn de la partioj, kiuj partoprenas en la registaro kiel speciale en tiujn de la Komunista Partio, al elementoj devenantaj de la ekstrema dekstreco, de personaj simpatiantoj kiel de ideologiaj koincidoj kiel antaŭ ĉio motivigo de la bezono defendi la privatajn interesojn de klaso, la et-burĝaro, ĉiam akcentanta pri la "tabueco" de la respekto al la privata propeco kiel al la ekspluatado al la homo de la homo. Scias tre bone la politikaj partioj, kiuj distingiĝas en tiuj senrespondecaj kondutoj, kiel pro eksperimentoj freŝaj kiel tragikaj, ke ĉiuj tiuj ĉi reakciaj procedmanieroj, kiuj ŝajnigas al ties vicaj konsiston de kia ili estas senaj, estas la sistemaj agentoj de la perfido al ties ideologio, kiun ili ne sentas, nek povas senti, al ties disciplino kiel al ties mandatoj.

Oni argumentis, ke estas necese allogi kiel alvenigi ĉiujn tiujn elementojn konfuzajn por aligi ilin al nia afero, al

la afero de la popolo, forgesante, ke tiuj "amikoj de la popolo" aperos kiel ŝajnaj amikoj de nia afero ĝis tia grado, ke povas en plena senpuniteco starigi sian kontraŭrevolucionan agadon kun siaj amikoj ĉiamaj. La realo donas respondon tre drameca al tiuj ĉi trodezeritaj prozelitoj pere de la malkovroj de la konspiroj, kiuj estas farataj en la postfronto de la lojala Respubliko, precize planataj k kun skandala senhonteco zorgataj speciale, de ĉi tiuj novuloj de la doktrinoj de la politikaj partioj, implikitaj en la ekzercado de la Povo.

IV

Kuriozaj k antaŭ ĉio edifaj estas la sintenoj, kiujn resumas la agadoj de pluraj homoj k de kelkaj politikaj partioj, antaŭ la fakto de la milito k la Revolucio, la plej grava el ĉiuj produktitaj en la historio de la sociaj movadoj de ĉiuj popoloj pro sia valoro de universala simbolo k pro la kruca momento, en kiu ĝi produktiĝas, momento decidiga por la sorto de la emancipiĝo de la laboristoj k por la supervivo de la demokrataj reĝimoj de la tuta Eŭropo k la Mondo.

Ne estas strange, ke la politikaj reprezentantoj de la etburĝaro, ĉiam inklinaj al la agitado de demagogioj escepte de tiuj, kiuj povus meti en danĝero aŭ en risko la principon de la privata posedo, la pograndan k pomalgrandan komercon k la pluespluatadon al la homo de la homo, adoptas sintenon de homoj premitaj de la fronto de la Revolucio k de la agado de la laboristoj, kiuj ilin eliminis, pro sia numero, pro sia batalemo k pro sia pli granda decidemo por ĉiurilataj oferoj, el la direktivaj postenoj, kien levigis ilin la mema popolo en pluraj okazoj kun la klara mandato, ke ili kanaligu k realigu la transformadojn, kiujn en ĉiuj aspektoj de la enlanda vivo postulis socie superregata de la potencaj interesoj de la feŭduloj, de la politika k ekonomia influo de la Eklezio k de la kuniĝo de la enlanda k eksterlanda kapitalismo, antaŭ kies aludoj k

ofensivoj, ĉiuj tiuj elementoj de la burĝaro ne volis kontraŭstari en la defendo de la popolo.

Kio rezultas malpli klarigebla, sed klarigebla, ekkonante la manovrojn de la personaj reakcioj k kompromisoj de la homoj, kiuj en la politika mondeto hispana agitiĝas ekde kiam restariĝis la Respubliko, estas, ke homoj, kiuj elstaris k influis interne de la organizoj de la laboristoj k de la proletaj partioj, partoprenas kun kuraĝo identa k sinteno analoga al tiu subtenata de la politikuloj aliĝintaj klare al la servo de la burĝaro, granda k eta, kiuj akceptas la revolucian faktan fatalan en la determinado de ĝies konsekvencoj k en ĝies eskplodo, kiel io kio estas fortranĉenda en la unua okazo favora, por ke ties persona influo ne estu eliminata el la politika vivo k el la ekonomia direktivado de la lando.

Tiele ni vidas, kiel la laboristaj amasoj sen apenaŭ pli armiloj k rimedoj ol sia kuraĝo, sed decidi defii la morton aŭ atingi la venkon, ĵetas sin al la batalo blindigitaj de la grandeco de la horo, sufokante la instinkton de la konservado en sia animo, dum la profesiaj politikuloj retiriĝas en ŝajna senagado. Kun raraj esceptoj, ili okupas sin pri aferoj iom klaraj eksterlande, okupas la diplomatajn postenojn, kun tre malofta fortuna en sia agado por la afero aŭtenta de la popolo.

Iuj sugestoj k eĉ ekscitaj sugestoj premaj devus ludi en ĉi tiu preparo de la perfortaj instrumentoj, kiuj aparte pligrandiĝas, kiam la aŭtenta reprezentado de la laboristoj lasas la Povon por labori k lukti en la tranĉeoj. De el ĉi tiu instanco de la politika agado de la registaro konstituita en Majo 1937 oni pretendas sen motivo detruo, senarmigi k obeigi al siaj verdiktoj ĉion kio povas konsistigi bazon de la Revolucio. Dume de el la ministeriaj departementoj oni donas la respondecojn de la samaj al politiko de allogo, de skandala prozelitismo k de komplezo, direktata speciale favore al la klasoj de elmontrita burĝa karaktero. Oni procedas al la re-eksproprio, k redonas al la posedintoj en

pograda maniero, ĉion kion posedas la laboristoj, preteks-
tante riparojn de maljustaĵoj de la Revolucio. Tio okazas
kun la tero, kun la domoj, kun la fabrikoj, kun la metiejoj,
kun la komercoj. Oni faras kampanjon kontraŭ ĉio kio
povas oferti signojn de influo k mastrado de la laboristoj
super la enlanda ekonomio, kampanjo demagogia k dan-
ĝera, ĉar ja la fermento de la plej virusa ekspansio de la
faŝismo ĉiam havis kiel principan veturilon la etburgaron,
pli atentema al siaj interesoj k al siaj egoismoj k al siaj
sonĝoj aliĝi en grandburgaro sen priskonsideri la rimed
elektadon.

La hispana etburgaro, escepte de honestaj individuoj,
kiuj komprenas sian historian devon antaŭ la ascenda im-
pulso de la proletaro al sia definitiva emancipiĝo, inklinas
esti progresema en ĉio tio, kio ne tuŝas eĉ minimume ĝies
interesojn materialajn k la trankvilecon de ĝies ĝuado.

En la kamparanaj zonoj, pro sia nekonsiderinda pro-
porcio interne de la ĝenerala amaso de la laboristoj, ĝi
aperas en multaj kazoj identifikita kun la propraj interesoj
de ĉi tiuj. En iuj lokoj, superregataj ĉiam de la reakcio.
la etburgaro konsistigas la plej rigidan bremson de ĉiu
progresema movado.

Post la 18 de Julio 1936 la progresema etburgaro ten-
dencis aliĝi kun siaj interesoj al la orbito de la influo el-
ĵetita de la interesoj de la laboristoj. La reakcia etburgaro
sonĝas, ke la faŝistoj gajnas la militon, kvankam siaj pro-
testoj de aliĝo al la popola afero antaŭ politikaj partioj,
antaŭ organizoj k antaŭ la registaro. Sed postulu al ĝi
oferon aŭ simple kaŭzi al ĝi maloportunaĵon, ĝi tuj plantas
konflikton k levas sian proteston al la ĉielo.

Estas donebla la argumento, ke opurtunismaj impera-
tivoj altrudis al certaj partioj, kiuj nomis sin proletaj k ĉ
komunista, la taktikon altiri la simpatian k la apogon de
la etburgaro, de la plej eta, post kiam ĝi pasigis iujn pe-
riodojn de maloportunaĵoj al kiuj ĝin devigis la necesoj
priatenti la frontojn k speciale la postulon de personaj

oferoj aŭ de siaj bienoj. Efektive la etburĝaro montris sin tiom tuŝata kiel konsekvenco de iuj trouzoj, kiuj eblis, eksplik blaj per la momento, kiu viviĝis k per la rezistoj aŭ la pasivecoj, pli aŭ malpli okulfrapaj, kiujn ĝi ofertis, k per la trouzoj k neegaleco en la trakto, kiun povis rezultigi la konfisko de efektivoj por la frontoj.

Ni ne malkonfesas rilate al tiuj konstatoj, ke estas fakraj trouzoj parte le malkomprenemaj. Sed de tie al la karakteriza ekprovo difinita de serio da agoj perfekte sistemigitaj meti la laboristojn al blindeca servo k sub la komandon de la elementoj, kiuj komunis kun la deklaritaj reprezentantoj de la burĝa klaso, ekzistas granda spaco.

Precize en la tagoj, en kiuj mi estas skribanta ĉi tiujn liniojn, oni rememorigas frazon de Lenin, kiu aparte havas specialan gravecon: "La rezulto de la Revolucio—diras la granda gvidinto de la Rusa Revolucio en sia verkaĵo "Du Taktikoj"—dependas de tio ĉu la laborista klaso ludos la rolon de helpanto al la burĝaro aŭ de direktivanto de la Popola Revolucio."

La direkto, kiun donas al siaj agadoj la elementoj, kiuj okupas la respondecajn postenojn, en la registaro en la aktualaj cirkonstancoj, tendencas klare meti la hispanan proletaron sub la pezon de la unua termino de la dilemo de Lenin.

Speciale la komunistoj k la socialistoj de la dekstro prezentas la pretekston, ke necesas atingi enlandan unuanimeton, kiam ĉi tiu estis atingita k de ili mem estis rompita, kio signifas apogi la etburĝaron, kiu en la malklaraj skandalaj negocoj de la milito pligrandiĝas sub la protektado de la politikuloj, apartigi el la politika k ekonomia influo la laboristojn, zorgi per ĉiuj procedmanieroj letargiigi k forlaciĝi la laboristajn amasojn en ties revolucia trajektorio, al kiuj oni rekomendas plurfoje k eĉ postulas de ili morti en la frontoj, obei blindece al la ordonoj, kiujn oni donas al ili, malfortiĝi en la laboro super la maŝinoj k sur la kampoj por produktadi kun intensiva ritmo de la

milito k ne peti kalkulon, se ili vidas, ke ties oferoj estas ekspluatataj.

Oni certigas, ke ĉi tiu konduto havas kiel motivigon la neceson flankenigi faktorojn, kiuj povus malakceli la marŝon de la milito al la rapida venko. Kun ĉi tiu oboe k pliekun aliaj apogoj de la laboristoj en la postfronto k kun la bloko de la tuta ega forto de la proletaro en la frontoj ne estis atingita flanke de la ekipo, kiu agadas de la registaro a in ol fiaskoj en la daŭro de la monatoj, en kiuj ĝies agado disvolviĝas.

Inter la senbrida prozelitismo de iuj grupoj implikitaj en la Povo, malfrue batitaj, kiam ja estis produktinta la plej konsiderindajn domaĝojn en la postfronto k en la fronto, flanke de tiu kiu havas sur sia respondeco k sur siaj vastaj ombroj la mision regi la ministerion de la Nacia Defendo, la kontraŭrevoluciaj stimuloj, en iuj de siaj aspektoj desegnitaj ĝis ĉi tie, kreiĝis konfuza situacio de elreviĝo ĉie, kiu povas esti konsiderata, ke estas direktata por atingo de celoj sen dubo, kiuj estonte elmontros ties fizionomiojn. Nuncioj de tiuj ĉi celoj estas la ripetataj apelacioj al la internaciaj postuloj k al la neceso oferi la ŝafon de nia moderiĝo al la ŝtatoj nomataj demokrataj ĝis nun kvietaj antaŭ nia profunda k terura tragedio. Tio ne povas alian ol konstitui potencon de negativaj faktoroj por la marŝo de nia milito al la necesa triumfo.

Ĉar la motoro, kiu generas la energion de la movado en la fronto ne estas ia abstraktaĵo, sed la idealo de la defendo de la laboristaj interesoj k tiuj de la Revolucio, la defendo k plifirmigo de la konkeroj atingitaj k la realigo de ĉio, kion la popolo pro sia propra impulso en agado ofensiva k defensiva samtempe sciis konkeri kun sia sango k kun la armiloj en la mano.

Por gajni la militon la unua faktoro, kiu estas prikonsiderenda antaŭ ĉiuj estas ĉi tiu. Malaperinte ĉi tiu iluzio k ĉi tiu sekureco por la batalantoj la luktado defalos fatale pro manko de ideologia motoro, ĉar ja neniakaze

estas forgesebla, ke la milito, kiun ni travivas, estas socia milito, k kiu ĝuste pro tiu neforlasebla karaktero, kaŭze de la solidaro de la internacia faŝismo al niaj malamikoj, ĝi aliĝis en milito por la sendependo de la lando, en kiu ne ventoliĝas dinastia problemo k la retronigo de reĝo, kiel en la milito por la sendependo k en la intercivitanaĵ militoj, kiuj detruis nian landon en la pasinta centjaro, sed la establo de profunda k daŭra transformado en Hispanio, kiu por ĉian metu la hispanon en nevenkebla pozicio kiel mastron de siaj politikaj k ekonomiaj destinoj, el kiu estas eliminata por ĉiam la ekspluatado al la homo de la homo k en kiu definitive firmiĝos la libera estonteco de la laboristoj.

Sen, ŝajne, interesiĝi pri tiuj ĉi konsideroj, la politika ekipo, kiu okupas la Povon praktikigas la trajektorion de agado, kiun ni trastudas k precizigas en ĉi tiu verkaĵo.

La agado de tiu ĉi politiko super la korpo el viva karno de nia lando produktas la efektojn, kiuj ankaŭ ni notis. Oni ja pretendas revalidigi la tutan mekanismon k la plej pereigajn malvirtojn de ĉio kio forrenversiĝis pro la propra fiasko de sia malefiko la 18 de Julio 1936. Ripetiĝas la procedmanieroj k eĉ la samaj homoj tiamaj por influi al determinoj ple gravaj. Oni ja akcelas la apartigon de la laboristoj el la direktivado de la ŝtatorganismoj k el la direktivaj instrumentoj de la enlanda ekonomio. Oni atakas de el la Povo la kolektivojn k faras la eblan por detruiri ilin.

Por eltiri la rimedojn k la instrumentojn, kiuj mas-trumas la ekonomion je la posedo de la laboristoj, oni prettekstas ordonojn en la direktivado flanke de la proletaraj organizoj, flanke de la entreprenoj, kiuj en momento de ĝenerala profaniĝo savis la organizitan proletaron el la ruiniĝo, kiuj garantiis plie la pluproduktados al la lojala servo dela antifaŝista afero. Ĉi tiuj kampanjoj de kalumnioj, kiuj kreskas kun la daŭro de la tempo, en forteco, en skandalo k en senhonteco, tendencas nature krei konfuziĝon k eksciti la malamon kontraŭ la proletaro de la etburgaro,

kiu, kiel ni jan diris, baldaŭ aliĝos en granda, dank' al la decidiga protektado, kiun ĝi ricevas k al ĝies cini-keco riĉiĝi je ĉiu kosto per la doloro k la egaj oferoj de la laboristoj en la frontoj k la postfronto.

La grandaj efektivaj rezervoj de la hispana popolo por alfronti la militon k la necesojn de la enlanda transformado, kiun la karaktero de la milito altrudas, estas, kiel ĉiam estis, en la sindikataraj organizoj U.G.T. k C.N.T. kun siaj milionoj da aliĝintoj k batalantoj. Do kontraŭ ili estis direktataj la plej teruraj ofensivoj k indignaj provokoj por subigi ilin al la kapricoj de politikaj grupoj, kiuj interne k ekstere de la du grandaj organizaĵoj havas tre etan valoron reprezentan.

Unue la ofensivo estis direktata kontraŭ C.N.T., kontraŭ ĝies batalantoj, kontraŭ ĝies amaso ĝenerale, tiel en la postfronto kiel en la frontoj. Poste ĝi estis realigita la provoko de skismo kontraŭ U.G.T., pro tio ke ĝi neis, en sia plej grandnoma k rajtigita herarkia reprezentado, la aliĝon de ĉio, kio spiras pure politikajn celojn, helpata pro priokupiĝo el la ekstero, kiu karakterizas la agadon de la registaro ekde la krizo de Majo, konturo, en kiu iuj politikaj grupoj komplotis en la aĉa entrepreno rompi la instrumenton de la registaro, kiu resumis la unuanimecon enlandan k antaŭgastan, kiun sciis aglutini Largo Cabaljero.

La manovro k la senhontaj aktivecoj en ĉi tiu senco de provokado pludaŭras flanke de iuj kampanjoj de gazetaro, nemalpli senrespondeca, gazetoj, kiuj estis fonditaj anticipi por tiuj ĉi celoj. La plimulto el la gazetaro, kiuj publikiĝas en Hispanio estas kontrolataj ekonomie k ofice, rilate al sia orientado, de la fortoj, kiuj reprezentas la registaron de Hispanio. Por la ceteraj ĵurnaloj sufiĉas la puno de la cenzuro (13).

(13) Krom la fonditaj por la specialaj celoj ĵurnaloj, la registaro, lastatempe, post sia translokiĝo al Barcelono, subvenciis kelkajn Barcelonajn ĵurnalojn. La ministro de la Defendo Prieto subvenciis per kelkaj milionoj la respublikanajn ĵurnalojn "El Deluvio", "La Vanzuardia" k kelkajn aliajn, kiuj antaŭevolucie ludis reakcian rolon. Tr.

Kiel devis savi sin la nova Aragonio el la sovaĝoj de ĉi tiu agadoj?

La aktuala registaro havis, doninte sian karakteron de servisto de sugestoj grandparte fremdaj al la interesoj de la popolo, pontecajn povojn por preni la decidon forigi la Konsilantaron de Aragonio k persekuti ĉiujn, kiuj, rekte aŭ malrekte, kontribuis al ĝies realiĝo. En Aragonio estis farita la milito interne de la medioj, pri kiuj disponis niaj batalantoj. Se ĉiuj frontoj estus imitintaj al Aragonio en sia rezistado, la malamikaro ne estus atinginta al la lokoj, kie sin trovas.

Sed en Aragonio krom la milito estis farita la Revolucio k estis plifirmitaj ĝies konkeroj en ĉiuj vilaĝoj.

Nur malrespondecaj elementoj povas prezenti la argumenton, ke la laborpopolo, kiu atingis konkeri kun sia forto, sia ofero k sia organizo, ĉiujn povojn, ĉiujn avantaĝojn k la tutan liberon, konsideras tiom eksterordinaran prosperon kiel fonto de malfeliĉoj k perturboj, kiuj malebligas la vivon de la Aragonaj laboristoj.

La samaj fenomenoj, kiujn ni priskribis en la antaŭaj paĝoj kiel esprimo de la ĝenerala situacio de la lando, elmontriĝis en Aragonio ekde la krizo de Majo, kiu pezos al la historio kiel forta provo al la kontraŭrevolucio en la bolado de la revolucia procezo en Hispanio.

Oni celis forigi k neniigi la novan organizadon realigitan en la lojala Aragonio k senhonorigi la revolucionan aktivecon de la aragonanoj.

Estis iniciatita ĉi tiu entrepreno kun kampanjo de kalumnioj kontraŭ la Kolektivoj, kontraŭ la homoj, kiuj mas-tris, kontraŭ la Prezidanto de la Konsilantaro Hoakin Askaso. Movis ĉi tiun ondon da skandaloj la agentoj de la politikaj partioj, senaj de ajna influo al la Aragonaj laboristoj. Baldaŭ ili trovis kunlaborantojn k kunlegianojn, kiujn aligis al la entrepreno, inter la reprezentantoj de la

kontraŭrevolucio, inter la grandaj k etaj friponoj, inter ĉiuj tuŝataj de la konsekvencoj de la transformadoj realigitaj sur la ekonomia kampo k en la organiza vivo de la vilaĝoj. La ĉefoj de la partioj, la funkciuloj, kiuj agadis en Aragonio artifice kontraŭ siaj lojalaj aŭtoritatuloj la embuskitaj faŝistoj, la komercistoj devenantaj el Katalunio, kiuj havis siajn feudajn bienojn k siajn negocojn en la Aragonia lando, k kiuj nun, antaŭ la rigora administrado de la Kolektivoj, k la ekzankta kono flanke de ĉi tiuj pri la defendaj rimedoj de la komunaj interesoj, aliĝis en agentoj de la vasta manovro kontraŭ la Aragona popolo. Trovinte la plej efikajn kunlaborantojn por siaj intrigoj inter la reprezentantoj de Aragonio en la parlamento, kiuj gardis sin ne aperi en la Aragona lando en la plej gravaj k dramecaj momentoj por alfronti ilin aŭdace. Ili konfidis la ekzercadon de ĉi tiu misio, kiun devis ili mem plenumi, al la aragonaj k katalunaj batalantoj. Sed tiom baldaŭ kiom registriĝis situacio favora al ties manovroj, ili eksentis nereteneblajn sopirojn savi la aragonanojn el la kaoso, kiun ties agentoj priskribis interese kiel ĝenerala klimato de la Aragona vivo. Ĉi tiuj reprezentantoj de Aragonio en la parlamento estis kiuj ricevis la frakasigajn informojn, kiuj cirkulis ĉirkaŭ la situacio en Aragonio, kiuj transdonis ilin al la registaro, per kiuj ili denunciis monstraĵajn kalumniojn kiel tiu ke pluraj Aragoniaj vilaĝoj, nepovante rezisti la reĝimon de premado k tiranio, al kiuj estis subgintaj la aŭtoritatuloj k la kolektivoj ilin, transpasis amase al la faŝistoj (14).

(14) Ai ĉi tiuj monstraĵaj kalumnioj fariĝis agente eĉ la esperantlingva gazeto "Popola Fronto", redaktata de kelkaj amikoj de U.R.S.S. En n-ro 20-21 la gazeto raportis: "Ni ne volas ĉi tie hodiaŭ fari kritikon pri ĝia tuta bazo k funkciado, ni nur mencias, ke tiu speco de regiona provizora registaro tre doktrinece, laŭ inspiro de tendenco, agadis k ne sciis ligi al sia politiko la aragonan kamparanon; ĝis tia ekstremo, ke multaj vilaĝanoj, pro la perfortigaj procedoj de la regantoj, forkuris al la faŝista teritorio." Tr.

Neniu povis pruvi ĉi tiun perfidan persvadadon nek iun ajn el ĉiuj, kiuj kontraŭ Aragonio leviĝis en la konfuza nubo da malpuraĵoj, kiu kontraŭ ĝi estis malligita. Legendo de teroro kuris de buŝo disvastigata de la intrigoj de ĉiuj ĉi tiuj homoj. La oficialaj gazetoj ekzercadis sin en ĉi tiuj miksaĵoj de senhonorigo k kontraŭrevolucia agado.

La politikaj partioj, kun eta reprezentado en Aragonio, en ĉi tiu situacio konfuza pensis, ke ili trovus rimedojn por kreskigi siajn efektivojn k sian influon k protektadis decide ĉiujn faŝistemulajn plendojn. La misfama kampanjo daŭris kun neaŭdita forto k havis esprimojn de maloftega malnobleco. Ĉu oni agadis kontraŭ la Konsilantaro de Aragonio kiel politika instrumento? Ne. Oni agadis kontraŭ la K lektivoj, kontraŭ la revoluciaj realigaĵoj atingitaj en la komarkoj de Aragonio (15).

Konsilantaro tiom ĵaluza al la interesoj de la laboristoj, kun tiom da doloro k entuziasmo, kun tiom de ŝvito k faritaj oferoj k metitaj en situacio de prospera profito sub la kolektiva signo, en kiu se ne havus plimulton C. N. T., estus sen dubo respektata. Kio interesos ĉiujn ĉi tiujn elementojn detruu estis unu el la bazoj de la autentika emancipiĝo de la proletaro k elimini la influon de C. N. T., al kies direktivanta agado ŝuldis speciale la konkerajoj, sen signifu, ke aliaj organizoj k reprezentantoj de politikaj partioj ne kunlaboris kun la lojaleco al la afero, ĝis la momento, en kiu ili ricevis la ordonon grupiĝi al la ofensivo kontraŭ C. N. T., kontraŭ la Konsilantaro de Aragonio k kontraŭ ĝies kreaĵoj. Pruvo pri tio estas la fakto, ke tagoj antaŭ ol la Konsilantaro estis forigita, ĉiuj organizoj politikaj sindikataj de Aragonio, per voĉdono de siaj rajtigataj reprezentantoj, rekonis antaŭ la centra registaro la efikon de la realigita laboro de la Aragona Konsilantaro sub la direktivado de ĝies prezedanto Askaso, kiun tak-

(15) Komarko-departemento. Tr.

sis kiel neanstataŭebla en la ŝarĝo de reprezentanto k delegato de la Respublika registaro. Ne malhelpis ĉi tiu certigo, en oficiala dokumento konstata, ke iom pli poste la agentoj de la kontraŭrevolucio k de la politikaj partioj, en kunveno okazigita en Barbastro, al kiu ĉeestis fine la parlamentaj reprezentantoj de Aragonio, senvalidigu la antaŭan voĉdonon de konfido k petis la forigon de la Konsilantaro, kies agado en mallonga periodo da tempo estis ekkonsiderata kiel inda ĉiajn kalumniojn.

Korespondis ĉi tiu nekvalifikebla agado al la sama intrigo, kiun zorgis disvastigi, ne nur tra Hispanio, sed ankaŭ ekstere de la landlimoj, kampanjo surbaze de falsajoj k insidoj kontraŭ la Armeo de Aragonio, pro tio ke ĝi estas integrata grandparte el elementoj de C. N. T., la samaj kiuj batalis kontraŭ la faŝismo de Barcelono k la Katalunaj vilaĝoj, je multaj kil metroj de la Kataluna ĉefurbo, k de la urboj, kie la malamikaro, kiel en Lerida, ofertis rezistadon duran k aŭdacan, ĝis kiam estis reduktita de la armiloj.

La bataloperacioj triumfe realigitaj de ĉi tiu Armeo, kontraŭ kiu estis diskonigitaj ĉiuspecaj kalumnioj, kiujn antifaŝistoj konas, donis al la justa objektivemo de la publika opinio konkeron de Belchite k Kodo, Kinto k la venkojn atingitajn en la Alta Aragonio en la lastaj tagoj.

En la plej gravaj momentoj, kiam la registro de la Respubliko bezonis oferti al la popola malkvietiĝo agadon de la armiloj triumfanta pro la cirkonstancoj, en kiuj troviĝis la lando, kiel konsekvenco de la seninterrompaj perdoj de la provincoj Basklando k Santander, kun siaj respektivaj ĉefaj urboj, la fronto de Aragonio k precize refalis la pli grada pezo de la bataloperacioj super la fortoj devenantaj el la malnovaj milicoj de C. N. T., savis la delikatan situacion, en kiu la registaro sin trovis k samtempe atingis efektivajn konkerojn, kiuj malfermas la vojojn de la sukceso por decidigaj bataloperacioj. Tiuj bravuloj, kiuj estis en la frontoj de Aragonio, sindonintaj sen

priokupiĝo al la heroeca agado, estas la herooj de Belchite k Kodo, Ties kalumniantoj, kiaj estis k estas ĉiuj burokratanoj, kiuj de el la komodaj apogseĝoj de la ministerioj de la oficialaj centroj, ĉiuj sinjoridoj k embuskitoj, kiuj de el la divanoj de la kafejoj prijuĝas la militon k ekskuzas sian malpurajn k sian dizerton el la plenumo de la devoj de simplaj hispanoj, kalumniante la batalantojn de la frontoj, povos daŭrigi sian taskon de sistemaj kalumniantoj de la aŭtentaj herooj de C. N. T. k U. G. T. k ĉio, kio rilatas al la organizitaj laboristaj amasoj.

La II de Aŭgusto (1937) per dekreto de la registaro estis deklarita forigita la Konsilantaro de Aragonio. La registaro fundamentis ĉi tiun decidon sur la neceso centriĝi en siajn manojn ĉiujn povojn. Oficialaj agentoj de la sama registaro en la gazetaro, komentante la forigon de la Konsilantaro, malkovras la veran celon, kiun ĉi tiu havas, certigante, ke en Aragonio ekzistis iuj sociaj eksperimentoj, kies procezon de plifirmiĝo en la vivo de Aragonio konvenis fortranĉi elradike. Estis la Kolektivoj.

Oni elektis ĝeneralan gubernatoron por la tuta zono de Aragonio, sinjoro Mantekon, apartenanta al la Respublikana Maldekstro. En la sama tago, en kiu oni publikigis la elekton de la nova gubernatoro k la forigon de la Konsilantaro kun grandaj titoloj, ke la Delegato de la Respublika registaro en Aragonio k la prezidanto de la Konsilantaro Hoakin Askaso estas procesata k enkarcerigita pro supozo, ke li estas respondeca de delikta akto de kontrabando de juveloj. Ne pasis eĉ unu monato k Hoakin Askaso estis liberigita. La supozata kulpigo baldaŭ malaperis, tiom baldaŭ kiom oni akiris la serĉatan politikan efekton por pravigi la akton de la forigo de la Konsilantaro.

Antaŭe estis irigita al Kaspe Brigado, kies anoj estis en sia plimulto el komunista ekstrakto k novuloj de laŭcirkonstanca komunismo, komandata de la konata komunisto

Lister, kiu sieĝis Alkanjiz k prenis permilite Kaspe, sidejo de la Konsilantaro de Aragonio, k donas sin al ĉiuspecaj provokoj. Ĝi invadas la vilaĝojn de la Aragona postfronto, detruas la Kolektivajn retenas k enkarcerigas sen iu garantio la kamaradonj direktivantojn de la samaj, arestas k provas fusilmortigi elstarajn membrojn de la Regiona Komitato de C. N. T. establita en Alkanjiz. Spite al la ordonoj de la gubernatoro k de la registaro, ĝi faras ĉiuklasajn ekscesojn. La membroj de la Konsilantaro de Aragonio estas retenitaj k enkarcerigitaj, la domiciloj de la organizantoj de C. N. T. estas alsaltataj k detruataj. Parto el la divizio Karlo Marks, konsistigata plimulte el anoj de P. S. U. C. de Katalunio, donas sin al analogaj fiagoj tra la vilaĝoj ĉirkaŭ la rivero Cinka. En la vilaĝoj, surbaze de ĉiuj friponoj k tuŝatoj, konstituigas novaj komunumaj konsilantaroj, post detruo de la ekzistantaj, enkarceligante la konsilantojn. Oni fondas Partiajn Komitatoj al kiuj apartenas, ĝenas la najbarojn k kun speciala kolero la kolektivanojn. Iuj el la direktivantoj de la Kolektivoj malaperas sen scio pri ties restadejoj.

La mema registaro de la Respubliko informinte sin pri ĉi tiuj fiagoj, venigas ordone la "respondeculojn" k severe admonas ilin. La teroro disvastiĝas tra la tuta zono inter la familioj de la laboristoj de Aragonio. La detruado de la Kolektivoj, la kolerplena persekutado k ĝenado kontraŭ la Aragonaj laboristoj estas farataj en la nomo de la superaj interesoj de la proletaro k la Respubliko. La oficialaj gazetoj estas silentantaj, kvankam ke ili konas ĉiujn ĉi tiujn fiagojn. La saman tagon, en kiu estis forigita la Konsilantaro k estis invadita la postfronto de la elementoj, kiujn ni citis, la oficialaj ĵurnaloj, kvazaŭ obeante al ĝenerala ordono, proklamis la venkon, ĵus atingita sen sango de la registaro. La ĵusa perdo tamen de Bilbao k Santander donis al ĉi tiuj oficialaj voĉoj la valoron de terura k tragedia sarkasmo. Konfirmis iuj el ĉi tiuj ĵurnaloj, ke Aragonio estas rekonkerita por la Respubliko.

Trista estas la venko de la registaro kontraŭ la kampanoj k la kolektivanoj, kiuj dum tuta jaro da laboro k batalo estis atingintaj per la sistemo de la kolektiva laboro k ekspluatado de la tero ciferon de produktado ĝis nun nekonatan. Oni festos la venkon de la kontraŭrevolucio. Se ĉi tiu ne atingis esti kompleta, ŝuldas al la kvieta sereno k al la koreco k la sentemo de la batalantoj de la Aragona fronto, kontraŭ kiuj estis direktata speciale tiu insido, ke vasta k detrua movado danĝera estis minacanta la postfronton, imputante ĉi tiujn krimajn aspirojn al la laboristaj organigoj. K ĉi tiuj onidiroj estas cirkuligataj tagojn antaŭe flanke de respondeculaj postenoj. Sen pretigi nomojn k detalojn, oni asertis artifike, ke la supercentro de ĉi tiu agado supozata radikas en la tranĉeoj de la Aragonaj frontoj. La provoko estis klara, sed pli klara estis la komprenemo k la firma decido gajni la militon k nerespondi pasie k perforte al provokoj, al kiuj ili plurfoje estis objekto. Ĉiu ja per sia agado difinas sian karakteron. La karaktero de la fortoj de la Revolucia Armeo de Aragonio estas difinita super ĝies konduto.

Ĉi tiuj estas la cirkonstancoj, kiuj akompanis la ofensivon, disvolvitan en la Aragonia tero kontraŭ la kreaĵoj de la laboristoj.

La Revolucio, en la periodo de sia procezo, ofertas fazojn danĝerajn por ĝies triumfo. Moviĝanta revolucia trajektorio havas antaŭeniradojn k retroiradojn. Sed la Revolucio daŭrigas sian marŝon. En Aragonio k en la tuta Hispanio. Nenio k neniu estingos la potencon fajrero, kiu flamigis la animojn de la hispaniaj laboristoj k irigis ilin al la frontoj por luktadi por la definitiva venko de la revoluciaj konkeraĵoj. Ĉi tiuj homoj alportos la triumfon de la Revolucio sur la pintoj de siaj bajonetoj venkantaj. Tiam venos la horo ankaŭ de la Justo k de la respondeco.

PRINTED IN SPAIN

Presita en Hispanio
en Marto 1938 en
2000 eidonkvanto.

Prezzo: 10 fr. fr.